

## **LEGOLIBRETO VII.**

**por karaj amikoj**

kolektis al vi  
Jindřiška Drahotová  
drahotova@esperanto.cz

**Ĉiu povas uzi tekston laŭ sia bezono**

**2012 Farite en presejo Ĉistá, Ĉeĥa respubliko**

**En paradiza naturo, kie vulpoj deziras: „Bonan nokton!“ kaj kie leontodoj salutas matene: „Bonan tagon!“, mi ĉerpis paradizan, bonan akvon de Avulino el Skokovy.**

Aleš Vávra.

En nia lernejo estas infanoj, kiuj venas el multaj landoj de la mondo. Niaj gepatroj venis tien ĉi por labori kaj tial ni ne povas iri al lernejoj en niaj propraj landoj. Ni nun loĝas for de la lokoj, kie ni naskiĝis.

En nia lernejo ni havas instruistojn, kiuj instruas al ni en Esperanto. Ni lernas en diversaj klasoj en kiuj estas infanoj de proksime la sama aĝo. Ni ankaŭ havas instruistojn, kiuj instruas al ni en nia gepatra lingvo. Por tiuj lecionoj infanoj ne estas grupitaj laŭ aĝo, sed laŭ la gepatra lingvo.

La instruistoj mem venas de diversaj landoj kaj je iuj festotagoj ili surmetas tradiciajn vestaĵojn de la lando en kiuj ili kreskis, sed kutime ili ĉiuj surhavas similspécajn vestaĵojn, sed ili tamen tute ne aspektas same. Kelkaj havas blondajn harojn, kelkaj nigrajn, la koloro de la haŭto estas hela aŭ malhela, iuj estas altaj, iuj malaltaj, dikaj aŭ maldikaj. Kvankam ili ĉiuj estas malsamaj, ili ĉiuj ŝatas paroli en Esperanto kaj estas bonaj amikoj.

Ĉiu grupo lernas alian nacian lingvon. Ni lernas kantojn de niaj landoj, folklorajn dancojn, historion de niaj regionoj, kulturon. La klasoj pri gimnastiko, matematiko ktp. estas en Esperanto kaj estas samaj por ĉiu infano en la sama klaso. La enhavo de la lecionoj en naciaj lingvoj dependas de la lingvo en kiu tiu lingvo estas parolata kaj do tiuj lecionoj ne samas por ĉiuj infanoj.

Sed unufoje ĉiujn tri monatoj ni havas komunan klason en Esperanto dum kiu ni parolas pri tio, kion ni lernis en niaj lecionoj en naciaj lingvoj. Ni faras etan prezentojn por ke infanoj de la aliaj grupoj povu lerni pri nia lando. Ni ĉiam antaŭĝojas dividi nian nacion kun la aliaj grupoj kaj diligente preparas mallongan paroladon.

Ĉi foje ni devas elekti faman esperantiston el nia lando kaj paroli pri li aŭ ŝi. Ni devas trovi foton de tiu persono sur la reto kaj iomete paroli pri lia aŭ ŝia vivo kaj priskribi mallonge kiel tiu persono kontribuis al la esperanto-movado.

Unue estas vico de Adamo, kiu venis el Aŭstralio.

„Mi elektis paroli pri **Ralph HARRY**. Li naskiĝis en 1917 en familio de politikistoj. Li estis tre bona lernanto kaj ricevis stipendion por studi juron en Britio. Li lernis Esperanton je la aĝo 20. Li fariĝis diplomato kaj laboris en diversaj landoj. Li kontribuis al la vortumado de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Li verkis interalie libron, kiu nomiĝas „La diplomato, kiu ridis“. Li mortis en 2002.“

Nun estas la vico de Sofia, kiu venas el Svisio.

„**Claude PIRON** naskiĝis en 1931. Lia gepatra lingvo estis franca, sed li ŝatis lerni lingvojn kaj lernis la ĉinan, la anglan, la rusan kaj la hispanan kaj fariĝis tradukisto. Poste li fariĝis psikologo. Li lernis Esperanton kiam li estis ankoraŭ lerneĵano kaj poste verkis sufiĉe multajn librojn, ekzemple detektivlibrojn kiel „Ĉu vi kuiras ĉine?“ Li mortis en 2002.“

Marko venas el Kroatio.

„Mi elektis paroli pri **Ivo LAPENNA**. Li naskiĝis en 1909 kaj mortis 1987. Li

fariĝis doktoro pri juro kaj instruis en Zagrebo kaj poste en Londono. Li fariĝis prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio en 1964 kaj restis prezidanto dek jarojn. Li bone kapablis publike paroli kaj verkis interalie libron kun titolo „Retoriko“. Danke al li okazis en 1954 la Montevidea rezolucio de UNESCO en kiu UNESCO oficiále agnoskas Esperanton.“

Ĉaba venas el Hungario.

„**Kalman KALOCSAY** naskiĝis en 1891 kaj mortis en 1976. Li fariĝis kuracisto kaj laboris en granda malsanulejo. Kalocsay verkis multajn poemojn. „Streĉita kordo“ estas kolekto de liaj poemoj kiu aperis en 1931. Li redaktis revuon nomitan „Literatura Mondo“. Li ankaŭ multe tradukis, ekzemple „La tempesto“-n de Shakespeare. Lia influo sur la esperanto-literaturon estis grandega.“

Boris venas el Ukrainio.

„Mi deziras paroli pri **Vasilij EROŜENKO**. Li naskiĝis en 1890 kaj mortis 1952. Li lernis Esperanton proksimume 1910. Kvankam li estis blinda, li multe vojaĝis kaj loĝis en Japanio kaj Ĉinio. Li ankaŭ bone kapablis japanan lingvon kaj verkis rakontojn en la japana por geknaboj. En 1923 ĉe la UK en Nürnberg li gajnis unuan premion en konkurso pro la plej bona prononco de Esperanto deklaminte sian originalan poemon „Ciganino.“

Ĝo venas el Suda Koreio.

„Mi elektis paroli pri **Lee CHONG-YEONG**. Li naskiĝis en 1932 kaj mortis en 2008. Li studis en pluraj universitatoj kaj doktoriĝis pri komerca ekonomiko. Li estis prezidanto de Universala Esperanto-Asocio de 1995 ĝis 1998. Al la demando kial li kandidatis por la posteno de prezidanto Lee Chong-Yeong respondis, ke li volis montri al la mondo, ke Esperanto estas ne nur eŭropa, sed tutmonda agado. En 2009 eldoniĝis memorlibro kun la titolo „Lee Chong-Yeong, gvidanto nia“.

Kazuki venas el Japanio.

„Mi parolos pri **Ossaka KENJI**. Li naskiĝis en 1888 kaj mortis 1969. Li lernis Esperanton en 1906. Li fariĝis universitata profesoro pri inĝeniera fako. En 1919 li kreis la Japanan Esperanto-Instituton. Unu jaron poste la unua numero de „La revue orienta“ aperis. Li verkis kaj tradukis poemojn, verkis lernolibrojn. Li tradukis fablojn de Ezopo.“

Petro venas el Skotlando.

„**William AULD** naskiĝis en 1924. Li loĝis en Skotlando kaj komencis lerni Esperanton je la aĝo de 13. Li fariĝis instruisto pri angla literaturo. Li verkis poemojn kiel „La infana raso“. Li redaktis plurajn revuojn, ekzemple „La brita esperantisto“. Li ankaŭ multe tradukis, ekzemple „Mastro de l'ringoj“ de Tolkien. Oni eĉ nomumis lin por la Nobel-premio pri literaturo. Li mortis en 2006.

Jen la fino de la prezento. Venontfoje la temo estos famaj kaj belaj konstruaĵoj en la diversaj landoj, do provu kolekti multajn fotojn. La prezento estis tre interesa, sed nun ni estas lacaj kaj kontentas povi iri hejmen por ripozi, rigardi televidon, ludi per niaj komputiloj, babili kun niaj geamikoj.

En nia lernejo ni studas pri respekto al malsimilaj personoj. Ni ne juĝu

personojn laŭ la religio, fizika aspekto, seksaj preferoj kiujn ili havas. Ni provu kompreni personojn, kiuj ne similas al ni. Ni ne primoku handikapulojn kaj ne pensu, ke personoj estas stultaj, se ili aspektas iom strange.

Ni ankaŭ lernas, ke la rajto komuniki en propra lingvo estas grava, ke ne estas juste devi paroli en lingvo kiun ni ne bone regas. Ni lernas ke ĉiuj kulturoj gravas, ne nur kulturoj de lingvoj vaste uzataj. Ni estas kuraĝigitaj lerni fremdajn lingvojn. Ni konscias, ke estas malfacile por enmigrintoj ekzemple lerni novan lingvon kaj do ni provas esti paciencaj kun ili kaj helpi ilin. Ni komprenas, ke la angla lingvo, kvankam nun vaste uzata, ne vere taŭgas kiel internacia lingvo, ĉar daŭras tro longe por sukcesi flue paroli ĝin kaj la prononcado estas malfacila por multaj personoj.

Ni ankaŭ lernas pri medio, pri la Tero, sur kiu ni ĉiuj vivas, pri endanĝerigitaj bestoj. Ni lernas, ke gravas la aero kiun ĉiuj enspiras, ke ĝi restus pura. Ne gravas, ĉu vi havas nigrajn harojn, blondajn, helan, malhelan haŭton, ni ĉiuj bezonas aeron por povi pluvivi. Ni bezonas puran akvon kaj do devas atenti ne malpurigi ĝin.

Ni ĉiuj deziras vojaĝi por vidi la hejmlandon de niaj amikoj. Ni interesiĝas pri tio, kio okazas ĉie en la mondo. Ni ne ignoras, ke la vivo en kelkaj landoj estas multe malpli facila ol en aliaj landoj, ke bazaj homaj rajtoj ne ĉie estas respektitaj. Iuj el ni eĉ revas vojaĝi al la Luno aŭ aliaj planedoj.

Ni zorgas, ke en iuj landoj multaj personoj estas tro malriĉaj por aĉeti medikamentojn kaj devas necese suferi pro malsanoj, ni zorgas, ke militoj okazas dum kiuj senkulpaj personoj mortas.

Diversaj landoj havas diversajn problemojn sed protektado de la medio estas grava ĉie. Tio kion unu lando faras povas havi sekvojn en tute alia lando. Nun ni estas ankoraŭ junaj kaj ne povas multon fari, tamen ni povas ŝpari iom da mono por donaci al malriĉaj infanoj, ni povas atenti ne forĵeti rubaĵon ie ajn. Ni povas trakti niajn geamikojn juste, ne primoki klasanon, kiu estas dika.

Ni deziras lerni pli kaj pli, sed ni scias, ke ni ĉion povas lerni. Ni ne povas lerni ĉiujn lingvojn de niaj amikoj, sed eĉ lerni nur kelkajn vortojn povas jam helpi montri, ke ni interesiĝas pri diversaj lingvoj, kulturoj.

Ni lernis, ke homoj estas homoj. Ĉiuj homoj havas deziron esti feliĉaj, volas vivi en medio kiu ne kaŭzos malsanojn. Ni deziras povi komuniki kun kiu ajn kaj do bezonas komunan lingvon. Ni scias, ke paroli komunan lingvon ne solvos ĉiujn problemojn, sed tamen Esperanto helpas personojn pli bone kompreni unu la alian. Ĝi donos voĉon al personoj kies gepatra lingvo ne estas vaste uzata kaj kiuj ne havas sufiĉe da tempo por studi lingvon kiel la anglan.



## Avulino el Skokovy – rememoroj de apotekisto

Antonín Kubánek 1966

„Náš Turnov“, gazeto de asocio de samurbanoj kaj amikoj de la urbo Turnov, Nr.  
24/2002

Tute grava raraĵo – en historio de apotekoj kaj drogvendejoj certe unika – estis liverado de varo por tre populara „avulino“ el Skokovy, posedantino de kuracpensiono en tiu ĉi vilaĝo proksime de la kastelo „Kost“. Mi ne scias, kiam ŝi komencis kuraci kaj kiel ŝi akiris famecon, sed estas eĉ nekredeble kiel multe da malsanuloj venis al ŝi, kaj ne nur el proksima ĉirkaŭaĵo, sed el tuta Bohemio, Aŭstrio eĉ el prusia Silezio. Ŝi kuracis – per ŝmiraĵoj, per senŝua promenado en roso, per masaĝo, tuŝfrapado, per akvo diversmaniere, kaj mi eĉ ne scias kiel alie. Homoj volonte plenumis ŝiajn ordonojn, kiuj havis racian kernon, sed eble inter ili estis ankaŭ strangaj. Mi bedaŭras, ke dum mia profesia vivo mi nesufiĉe interesiĝis pri ŝia populareco, nur poste mi ekmiris, kiam mi legis artikolon de la redaktoro Sekanina en la ĵurnalo “Národní politika”, jam longe post la morto de tiu ĉi naturkuracisto, kiu el medicin-scienco sciis preskaŭ nenion. Tiel admirplene li skribis pri ŝi – kiel pri siasence natursorĉistino.

Kiam ŝi komencis agi en Skokovy, ŝi venis al nia farmaci-magistro, por ke li miksu kaj liveru al ŝi ruĝan unĝventon el tutino, frutino kaj serpenta graso, tre odoraĉan densan abian ŝmiraĵon, pilolojn por sango kaj eble tri specojn de miksitaj drogherboj. Tio estis bazo de ŝia kuracado. Plu ŝi petis oleon por tuŝadfrapado, post kiu aperadas pustuloj. La magistro volonte ĉion por ŝi preparis, miksis, sed laŭ propra opinio, kaj eĉ aldonis kelkajn konsilojn. Li havis nur kondiĉon, ke la oleon por la tuŝfrapado liveros al ŝi po malgranda kvanto iu el liaj laborantoj.

Vere multe da kuraciloj, kiuj helpis al ŝia populareco, estis ĉe ni preparataj. Por forporti la medikamentojn venadis silentema, fidinda viro kun korbego surdorse. Blankan ŝmiraĵon ni miksis ĉiam en 200-litran barelon kaj distribuis ĝin en boteloj po 1,5 litro. La drogherba miksaĵo estis stokita en grandaj kestoj kaj per la unĝventoj ni plenigis 50-70 tigletojn, po 50 gramoj. Iam okazis, ke pro sanzorga kontrolo (la avulino havis multe da enviuloj) la tuta mendo estis ĵetita en fekaĵputon kaj venonttage venis dungito el Skokovy kun korbo por nova varo. Kun la krotona oleo („Croton tigilium“) iradis iu el ni. (La vojo al Skokovy daŭris kelkajn horojn.) Ni ĉiam estis de ŝi atentigitaj, ke iam-tiam estis en la medikamentoj malmulte da serpenta graso, plimulte da frutino kaj ŝi avertis nin, ke ni estu atentemaj, ĉar temas pri grave malsanaj kaj eminentaj homoj. Ĉiam ni ricevis bieron kaj unu kronon, sen proteste.

Ŝi mem ne venadis en la drogejon ofte, nur kiam ŝi bezonis ian urĝan konsilon, ŝi alvenis al la magistro diskrete tra doma pordo kaj la interparolo okazis en kuirejo. Por distrado de siaj pacientoj ŝi aranĝadis ekskursojn en Bohemia paradizo, sur kradĉarego ornamita per koniferaĵoj. Unu-dufoje jare ŝi aperis sur la placo en Turnov kaj oni ŝin fotis kun pacientoj. Ŝi havis malaltan staturon, iom dikan, do ŝi ĉiam dum la fotografado staris sur ĉaro apud sidanta ĉaristo, por dominantia. Dum malfavora

vetero ŝi kartludis kun pacientoj.

Multaj malsanuloj nur alvenadis por konsilo eĉ kuraco. Tiuj pli grave malsanaj loĝis en du duetaĝaj domoj. En unu el ili estis restoracio, kie malsanuloj manĝis. La domoj estis ĉe la rando de arbaro kaj herbejoj, kie okazis promenoj, matene en herbo plena de roso, sensŭe. La kuracejo funkciis de printempo ĝis aŭtuno. Vintre la posedantino ne estis ĉiam hejme. Trafis ŝin kelkaj malgrablaĵoj pri kuracado kaj pro tio okazadis oftaj kontroloj flanke de oficoj, eĉ komision-esploradoj, kiuj alĝvidis la “avulinon” antaŭ tribunalon. Se ne estis evito, kaj la monpunoj ne sufiĉis, ŝia eminenta advokato ĉiam konvinkis la tribunalon, ke la vintraj monatoj estas al lia klient-ino plej taŭgaj por ripozo – kiun ŝi, post tiom da someraj zorgoj, nepre bezonas.

Multe kaŭzis ankaŭ la fakto, ke en la penziono longe ne estis daŭre servanta medicina doktoro. Tiun gravan obstaklon solvis la “avulino” jene: sian junan, belan, adoptitan filinon ŝi edzinigis al ne tro juna doktoro. Ĉi tie eblus komenciĝi interesa, certe sukcesa romano, sed neniu ankoraŭ verkis ĝin. Memorantuloj jam delonge forpasis, kaj se aliaj, pli allogaj roman-motivoj enfalis en profundon de forgeso, en ĝin falu ankaŭ la motivo tiu ĉi.

Skokovy-n mi vizitis kelkfoje, ankaŭ en dimanĉaj posttagmezoj, kiam venadis vizitoj al malsanuloj, kaj mi miris kiel multe da fidemuloj venis; el larĝa ĉirkaŭaĵo. La tempo estis jam tia. Oftaj estis procesioj al multaj lokoj, kie homoj serĉis konsolon kaj dian gracon por siaj preĝoj. Kelkfoje mi kaptis ideon, se okazus ia miraklo, ia relevacio ĉe akvofontujo, kiel tio kutime okazadis, kaj oni aldonus famecon de la naturkuracistino – kiel Skokovy enorme famiĝus!

Sed eĉ sen miraklo homoj alvenadis en firma espero, ke ilia vivo estos plidaŭrigita per tutino, frutino kaj serpenta graso kaj per aliaj similaj medikamentoj, pri kiuj oni eĉ ne sciis, ke ili ekzistas. Tiuj ĉiuj miraklaj medikamentoj, per kiuj la “avulino” kuracis siajn pacientojn, estis preparataj laŭ pripenso de nia magistro kaj farataj kaj mikсатаj sur tabloj de nia drogejo, eĉ sur korto aŭ sub tegmento de nia drogvendejo.

Pri kio mi skribas, forpasis en nebulo. Mi povas konfesi, ke mi volonte rememoras miajn praktikadajn junajn jarojn. Ne nur pro tio, ke ĉiu ŝatas rememori sian junecon, sed mi travivadis specifan parton de negoca agado, plenan de diverseco kaj surprizoj, ŝanĝoj kaj spertoj, kiuj apenaŭ estis eblaj en aliaj sferoj.. Nun ŝajnas al mi ĉio kvazaŭ sonĝa, kompare kun nuntempaj apotekoj aŭ drogejoj.

Jindřiška Drahotová, Margit Turková.

## Aŭtuno

Kerstin Rohdin, Svedujo

Aŭtuno komenciĝas: Fino de septembro. Kelkaj tagoj belaj varmaj. Mi povas sidi ekstere en la arbaro aŭ en parkoj en Stockholm legante. Ĝus nun mi legas libron, kiu fikcie estas verkita de Lorenzo Da Ponte, kiu verkis libretojn por operoj de Mozart. Li rakontas pri sia vivo kaj pri sia kunlaboro kun Mozart. La stilo de la libro estas tre agrabla. Legante mi sentas min vizitanta la 18-an jarcenton.

Iun sunan tagon mi sidis kun mia libro apud la Reĝa Biblioteko (nacia biblioteko). La parko apud ĝi ricevis novan statuon de verkisto Hjalmar Söderberg. Li estis famulo en la sveda literaturo komence de la 20-a jarcento. Li promenis tra Stockholm kaj "observis" kiel la verkistoj faris en tiu periodo. En la Reĝa Ĝardeno situas kafejo memore al li. Ĝi ludas gravan rolon en lia romano "Doktoro Glas". En tiu loko situis akvotrinkejo kaj s-ro Glas miksis arsenikon en glason da akvo por la edzo de unu el liaj pacientoj, juna, bela edzino de maljuna pastro. Hjalmar Söderberg apartenis al la "observantoj" de la vivo, de la homoj, de sia urbo Stockholm, kiun li tre ŝatis. Mi nun bone komprenas tion, kiam mi promenas en la sama urbo.

Mi loĝas jam dum tri jaroj apud tiu urbo. Dum miaj ĉirkaŭvagoj mi ekkonis la urbon, ekŝatis ĝiajn akvosurfacojn kaj belajn domfasadojn. Mi trovis kelkajn ejojn, kie mi sidas kaj observas la vivon de la urbo aŭ ĝuas bongustan manĝaĵon. Vidas la rapidan kuradon de homamaso sur Hötorget (pajloplaco) en la centro de la urbo. Multe da fruktoj, legomoj kaj floroj aĉeteblas tie. La homoj rapidas al diversaj farendaĵoj aŭ se la suno iom videblas kaj varmas la homoj ĝuas ĝin sur la ŝtuparo de la blufarbita Koncertejo, kie la 10-an de decembro la Nobelpremio solene estas disdonata.

Mi kelkfoje sidas apud Strömmen (torento) apud la Parlamentejo kaj la Muzeo pri la Mezepoko en urbo Stockholm, kiu tiam aspektis tute alie ol hodiaŭ. Sidi apud rapidfluanta akvo centre en la urbo, dum krepuskiĝas varma somera vespero, estas ĝuo. Videblas ĉirkaŭ mi la Reĝa Palaco, la Parlamentejo, la Operejo kaj mia amata ruĝa preĝejo de Jakob. Mi vizitis plurajn el la preĝejoj en Stockholm, kie oni tre ofte povas aŭskulti orgenkonzertojn senkoste; Bach, Beethoven, César Franck, Händel k.a. Dum la aŭtuno okazis pluraj koncertoj sub la nomo "Vox pacis". Tiam mi aŭskultis muzikon de sameoj (jojkoj), tibetanoj, (blovinstrumento) hindoj (tamburoj), ankaŭ kantistoj – dancistoj el diversaj religiaj tradicioj. Mi sentis la mondon malfermatan alveni en mian urbon.

En profundaj grotoj sub Skeppsholmen (la porŝipa insuleto) eblas ĉiaŭtune renkonti la argilajn soldatojn el Ĉinio tre bone ekspoziciitajn. Imagu promeni inter "artaĵoj" faritaj antaŭ 4000-5000 jaroj en la alia flanko de nia globo! La tekstoj tre pedagogie instruas pri la malnova historio kaj vivo de la unua imperiestro de la imperio de Qin. Ekster la Orientazia Muzeo, kiu situas super la grotoj la supervido al Malnova Urbo kaj akvoj plenaj de boatoj brilas en la bela aŭtuna vetero.

En la apuda Nacia Muzeo post studo de pluraj ĉambregoj de Arto mi povas en la kafejo ĝui miraklan ĉokoladtorton – preskaŭ same bongustan kiel tiu en la Rusa

Muzeo en St.Peterburgo. Kun bona gvidisto mi ĉirkaŭpromenis en la Malnova Urbo, en la kvartaloj de Bellman nia granda verkisto kaj trubaduro el la 18-a jarcento. Tiam la plej multaj de la enloĝantoj de Stockholm loĝis en la Malnova Urbo ĉirkaŭ 30.000. Ili trinkis dekoble da alkoholo – biero ol nun. Akvo ne trinkeblis pro malpureco. La stratoj malbonodoris de malpura forĵetaĵo. Kia diferenco dum pli malpli ducent jaroj ! Mi trovis malnovan restoracion de la 16-a jarcento kun la nomo Magnus Ladulås. – unu el la plej unuaj reĝoj de Sveda Regno. Tie bongustis malgrandaj frititaj haringoj, tipaj en la Svedio.

Kiam ankoraŭ la finsomera suno brilis, mi vojaĝis per etaj boatoj al urbetoj en la arkipelago – urbetoj kun ruĝaj aŭ flavaj lignaj dometoj. Ĉe la maro plej ofte la dometoj estas flavaj aŭ eble blankaj. En la arbaro ili estas ruĝkoloraj. La vivo trankvilas en la etaj havenoj kaj en la apudmaraj urbetoj. Laŭdire la arkipelago inkluzive la urbo konsistas el 30.000 insuloj kaj insuletoj. Pluraj el ili estas rokoj kaj montetoj. Multaj havenoj kun ŝipoj kaj boatoj, kiuj iras al aliaj havenoj ĉe la Balta Maro; ĉefe al Finnlando kaj Estonio. De la alvenantaj ŝipoj vi povas vidi la Artan Ĝardenon « Millesgården » (la Gardeno de Milles), kie la statuoj etendiĝas al la ĉielo. Unu el la plej konataj estas « Mano de Dio» granda mano sur kiu staras homo. Tiom da ĝuindaj, belaj lokoj inter akvo kaj rokoj troveblas en Stockholm. Mi nur tuŝis kelkajn lokojn, kiujn mi laste vizitis.

Per tiuj bildoj mi volas saluti vin de Stockholm kaj rakonti al vi iom pri miaj travivaĵoj dum la lastaj someraj tagoj. Mi ankaŭ estas tre dankema, ke mi povas kaj kapablas ĝui tiajn belajn tagojn, ke mi kapablas iri kaj vidi.

Fine de septembro 2010.

## **Bluĉiela Mongolio**

**Elda Doerfler**

Mongolio. Lando de Hunoj. La mita Ĉingis-Ĥaano. S e n f i n o. Ŝamanismo. Nomadoj. Geroj. Ĉevaloj. Prerioj... La nulo kaj la tuto! Kaj super ĉio la bluo de la ĉielo kaj la nepriskribebla ruĝo de la malleviĝanta suno. Imagoj kaj fantazio intermiksiĝas, iel oni ne klopodu lasi sin influi de televida speкто aŭ legaĵoj en libroj: mem oni deziras sperti, mem tuŝi per mano, mem oni volu droni en la senfino por povi fine aserti, ke, iel kaj iom, oni sukcesis aliri al pasinteco kaj estanteco de mongoloj! La rigardo flugas foren, ĉiam pli foren, sed tiu foro ne havas limojn. Vi staras, rigardas ĉirkaŭen, ĉirkaŭ vi mem turniĝas, 360-grade, kaj... verdo, montetoj, rokoj, herboj, padoj... Tie malproksime aro da galopantaj ĉevaloj... Kies ili estas? Nenies! Liberaj ili kuras laŭ la ventoblovoj, malaperas, sed kien? La prerio estas senfina, la okuloj, nealkutimitaj al tiuj distancoj, ne plu kapablas sekvi ilin... Kaj jen, el nenio, aperas en ĉielo aglo, blankkapa: per malrapidaj, silentaj rondiroj laŭ la fluo de la vento ĝi sekvas ion — ĉu muson, ĉu birdon? - tien, tien al la malproksimo. Sablo, dunoj, etaj spuroj fosetas la flavetan surfacon... Jen truo, pli granda, tiu, pli



malgranda ... Kiu tie sin kaŝas? Herboj, altaj, sekaj, malmole dornaj... floroj flavaj, ruĝaj, bluaj buntigas la ondumantajn montetojn. Kranio, pure blanka, ĉirkaŭe kelkaj ostoj: restaĵoj de mortinta ĉevalo. Vivo kaj morto harmonie kunestas en la grandioza naturo: tia vido donas impreson nemalagrablan, tio estas nura aspekto de la normalo, de tio kio normalas en la vivo de ĉiu kreitaĵo. *Ovo* sur altaĵeto: kio ĝi estas? Kion ĝi signifas? Ofero al la diaĵoj: ankaŭ vi sekvu la riton. Ĉirkaŭiru ĝin trifoje, laŭ la horloĝmontrila direkto, esprimu deziron, surmetu plian ŝtonon aŭ bluan skarpon, simbolon de la ĉielo... Ĉu aspekto de ŝamanismo aŭ de budaismo? Oni ne komprenas entute, tamen tiuj tumuloj, konkretaj atestoj de religio de mongoloj, ĉiam naskas senton tre respektaman. Ĉiam pli foren, laŭ pasejoj apenaŭ rimarkeblaj, sekvante la spurojn de nomadaj ĉaroj, trairante fundon de senakvaj riveroj: atentu, kavaĵoj, ke ne renversiĝos la aŭto. Ne timu: sperta ŝoforo tre bone konas tiun grundon, estu certa ke oni atingos la celon en gloro! Piede de monteto, blankaj geroj: unu, du, ne tiom pli. Kaj apude, la ferĉevalo, la motorciklo, aŭ japana ĵipo; malantaŭe, kamelo. Arego da ŝafoj paŝtas trankvile, zorge kontrolita de juna ĉeval-rajdanto. Fojfoje, subite, transiro de la spurvojo: atentu la ŝafidojn, ili ankoraŭ ne scias kiom danĝeraj povas esti aŭtomobiloj! Suno, arda suno bruligas haŭton kaj kapon. Kie ombro? Nenie! Kiel sin ŝirmi? Neeblas! Tamen, kuraĝe antaŭen! Mi nepre volas supreniri la monteton, ĝi estas sufiĉe malproksima, certe tie mi trovos la ... finon! Ĉapo malhelpas kompletan „sekiĝon“ de la cerbo, ankoraŭ bone mi sukcesas rezoni: do, ek tien, supren! Leporo subite aperas kaj subite malaperas en iun kaŝejon. Verda estas la deklivo, sed ne pro herboj: verdkoloraj estas la ŝtonoj, tajlitaj kiel kristaloj, kubo-, prismo-formaj: mirindaj! Spirado iom pli rapida, ekmarŝo iom pli hasta, baldaŭ la pinto! Ne, ne estas la fino, alia pinto iom pli fora! Ek al tiu! Ankoraŭ unu alia, kaj alia, kaj alia: senfine. Kaj mi rigardas horizonten, kie montetoj ondumadas unu post la alia, en plej diversnuancaj koloroj de la grizo, kio denove atentigas ke la foro estas senfina. Kaoso, daŭra fajfado de policanoj, hupado senfina de ŝoforoj (jes, ankaŭ tio senfina!), dekoj kaj dekoj da veturiloj marŝas senhalte unu post la alia. Transiri straton por piediranto estas kiel defii la sorton: aŭ tute sendifekte oni atingos la vid-alvidan trotuaron aŭ ...oni rezignu kaj atendu almenaŭ noktomezon por reiri al tranoktejo. Surprizas, kiel oni tuj adaptiĝas al la lokaj cirkonstancoj, kaj post unua-, dua-, triafoja hezitemo oni eklernas la lecionon, kaj, imitante la lokanojn, kuraĝas zigzage inter unu aŭto kaj la alia, por fine saviĝi de aŭtomobila surtretuigo. Moderno, malmoderno, novklasikstilaj palacoj, ruĝaj, ruĝetaj, lazuraj, verdetaj, duonkonstruitaj nubskrapuloj, betono, skafaldoj, lignaj domoj, blanka geedziĝa palaco, la templo de Choijinlamao, vitro-spegula blua konstruaĵo velo-forma, vastega placo kaj jen li, Li, la heroo, la mita heroo: Ĉingis-Ĥaano. La marmora scenejo ĉirkaŭas Lin: imponas la bronza statuo, kiu sentigas la gravecon de lia superrega rolo en la historio de Mongolio. Ĉeflanke la filoj *Ogedei* kaj *Kublai*, pli antaŭe gardas la enirejon al la monumento du famaj militistoj, *Boruchu* kaj *Mukhlai*. Tiu loko estas la kerno de Ulan-Batoro: tie okazis (kaj okazas) multaj gravaj eventoj: revoluciaj, politikaj, ceremoniaj, paradaj kaj eĉ koncertaj. Varmega suno daŭre bruligas: nepras trovi ŝirmejon, kie trinki ion kaj ankaŭ manĝi por reakiri perditan energion. Ne malfacilas trovi ĝin, nur malfacilas la elekto: jen tiu, tute tipa, simpla sed la fakto, ke

tie sidas multaj lokanoj, sugestas ke certe estas la perfekta loko kie bonguste manĝi (almenaŭ laŭ nia okcidenta pensmaniero!). Jam sidi en freŝeta medio kaj sensojfiĝi per „Chinggis“-biero, pli komfortigas kaj do, oni kuraĝas alpaŝi al la dua malfacilo: legado de la menuo en cirila alfabeto! *Skolte khood, buuz, khuushuur, tsuivan, khuurag...* je fermitaj okuloj mi metas mian fingron tie... elekto farita! Je nia sano, ni tostu per freŝa biero kaj manĝu apetite kion mongoloj jam de jarcentoj frandeme manĝas! Kiom malproksima la teatro! Ni iru taksie, troas la distanco kaj tiu varma suno, kiu tamen, matene ĉu vespere, kapablas doni tiel grandajn emociojn, farbante la ĉielon per revigaj koloroj. Kia spektaklo! Aŭskultado de muziko kaj kanto, tiu fama gorĝa kanto, *khoodii*: sentoj plejdiversaj eksplodas en la interno, oni eksentas artfajraĵojn en sia memo, oni ekemas plori pro la intensa emocio onin kaptanta. Kia muziko! Ĝi elvokas galopadon de ĉevaloj en la vasta senfino. Daŭre revenas tiu sento pri senfino, senfino kiu liberigas vin el ĉiuj ĉenoj, vi eksentas vivi libere, vi ŝvebas en la ĉielo, en la nuboj, tra tiuj nepriskribeblaj koloroj de sunleviĝo, tra l' ruĝooranĝo de la astra malapero malantaŭ la horizonto, transportata de tiuj magiaj kanto kaj muziko Vasteco, senfino, senlimaj horizontoj, verdo de la montetoj, flavo de la dunoj, bluo de la ĉielo, agloj, falkoj, ĉevaloj, ŝafoj, kaproj, kameloj, vizaĝoj skulptitaj, bronzaj, sunbrunigitaj, okuloj gajaj, buŝoj ridetantaj - intensaj emocioj plenigas la koron kaj la menson, emocioj neniam antaŭe spertitaj. Ĉio ĉi, kaj ankoraŭ multo pli, kion bedaŭrinde malfacilas surpaperigi, estis kaj estas por mi Mongolio, la tero de la blua ĉielo, la lando de prerioj kaj dezertoj, la teritorio de Hunoj kaj Ĉingis-Haano, la hejmo de la mongoloj, kiuj vivas en la nuntempo fieraj pri propraj historio, lingvo, muziko, kostumoj kaj vivstilo, kiuj konservas ame siajn tradiciojn de antaŭjarcentoj, akceptante samtempe la modernon kaj ties neeviteblajn transformigojn, sen forgesi pri la graveco daŭre gardi la grandajn valorojn de sia antikva kulturo.

## **Ĉu povas esti malalta viro alloga por virino?**

Eva Papoušková

Mia avino ĉiam instigis min: „Neniam vi trovu por si malaltan viron, li kovrilon ĉiam drapiras“. Ĉar mi estis okjara, mi ne komprenis kial drapiri kovrilon, mi pensis, ke pro tio, ke li povu libere spiri. Tamen mi obeis konsilon de la avino kaj pri malaltaj viroj mi atentis.

Sed dum jaroj mi spertiĝis per studo de viroj kaj miaj opinioj estiĝis malaj. Malalta viro, granda defio kaj neimagebla trezoro!

Malalta viro fruntas malfacilaĵojn. En viraj grupoj lin oni senĉese preterrigardas. Niaj virinaj gamboj tre bele aspektas sur altaj kalkanumoj, por li tio estas tuta katastrofo. Nura ŝanco estas buldoga persisteco kaj peno montri al mondo, ke: „Mi kostas pli ol 150!“

Pli poste tia viro, trairante per ardaĵ ekzamenoj, estas rekompencata, tre ofte, per deca banka konto, per akra kirurgia skalpelo, aŭ ministeria skribotablo, ktp.

Krome ekzistas sorĉoj de malaltaj viroj, kiuj ilian handikapecon tute nuligas. Unue temas pri ĉarmo. Ili tre bone scias, longe forprenataj de siaj longaj kolegoj, ke ĝustan virinon ili povas kapti per inteligenteco, humuro, afableco kaj originaleco. Due: la plimulto de virinoj estas dotitaj per patrinaj ecoj kaj kiam alvenas io eta, agrabla, ili ĉiam estas akceptemaj. Mi serĉas tiujn virojn, ĉar mi ne volas lasi forpasi trezoron de taktopleneco, atentemeco kaj senco por detalaĵoj!

Por resumo eldiro de iu slovaka vendistino al iu malalta kliento: „Se dio ne donis al vi altaĵon, certe dotis vin per longaĵo.“

Do, vidu kara avino, kion vi dirus?!

Traduko J.Drahotová, kun permeso de aŭtorino.

## Pri stelo Sírius kaj libertempo

Vladimír Mates

Por „ferioj“, „libertempo“ kaj „tagoj de hundo“ (aŭ hundaj tagoj?) por ĉeĥoj servas la vorto „*prázdniny*“. Ankoraŭ oni povas ie neofte aŭdi esprimon „vakace“ kaj poetoj povas uzi „*férie*“, ankoraŭ iel komprenebla. Sed en Eŭropo la tiuj du vortoj, por ni malmodaj, kun fajnaj ŝanĝoj plu floras. Pola: „*ferie szkolna*“, germana „*Ferien*“ estas uzata prefere kontraŭ „*Vakanz*“, kiu ankaŭ malmodiĝis, kiel ĉe ni. En Hispanio „*vacaciones*“ estas normala, ĉe francoj kaj italoj „*vacanze*“ kaj „*ferie*“. „*Vaocation*“ uzas angloj, krom ilia propra „*holiday*“.

Ĉiuj tiuj vortoj servas ankaŭ por libertempo de laborantoj. La vorto „vakace“ devenas el la latina „*vakatio-vako*“. „*Ferie – dies feriae*“ – diaj tagoj – festotagoj. Ordinarajn tagojn oni nomis „*dies profesti*“. Diecon portas en si eĉ „*holiday*“.

Rusio estas ankaŭ en Eŭropo, sed rusoj iel diversiĝas per siaj „*каникулы*“. Estas interese, ke neniuj en romanidaj lingvoj uzas ĝin. La vorto „*каникулы*“ devenas el la parolo de romianoj: „*dies caniculares*“ (canis = hundo).

Por ni, ĉeĥoj la hundaj tagoj signifas tagoj de pluva malbela vetero, kiam homo ne pelus hundon eksteren. Sed en Slovakio, nia frata lando kaj en Hungario, la vortoj „*kanikula - kanikulai*“ estas tempo de varmega vetero.

Sed! La inspiro por tiu vorto ne estas hundoj! Tio estas malnovaj mitoj pri „*Hunda stelo*“ – Sírius. La hundo Orion, kiu pro siaj fidelaj servoj estis de dioj levita al ĉielo. La stelo en stelaro „Orion“ – SIRIUS estas brila kaj bone observebla en Romo dum julio kaj aŭgusto, do estiĝis simbolo de varmegaj tagoj.

Nu, rusoj daŭrigis antikvan legendon per sia lingvo pri la stelo malproksima pli ol 8 lumjaroj (300 000 km x 60 x 60 x 24 x 365 x 8).

JoDo.

## Interparolo en ĉielo

Anonimo el interreto

Iam demandis Dio al sankta Francisko: „Kara Francisko, vi scias ĉion pri ĝardenoj kaj naturo, kio okazas sur la terglobo? Kio okazis al leontodoj, fialoj, lekantetoj kaj pluraj aliaj, kiun mi semis antaŭ longa tempo? Mi intencis perfektan planon sen prizorgado. Miaj plantoj povis kreski en iu ajn grundo, ili rezistis sekecon kaj mem obliĝis. Floroj longe floris, donacis al papilioj, abeloj, insektoj kaj grupoj de kantbirdoj sian nektaron. Mi esperis, ke mi vidos belajn ĝardenojn plenaj de multkoloraj floroj, sed nun mi vidas multe da verdaj surfacoj...“

Sankta Francisko respondas: „Tio kaŭzas speciala tribo de homoj. Ili komencis nomi la florojn „herbaĉo“ kaj kiel ili eblas, forigas ĝin kaj anstataŭas ĝin per herbo.“

La Dio: „Per herbo? Sed tio enuas, tio ne estas multkolora. Tio ne allogas abelojn, papiliojn, eĉ ne birdojn, nur larvojn de majskaraboj kaj lumbrikojn. Al tia herbejo influas ŝanĝoj de temperaturoj. Ĉu vere tiu tribo volas, ke kreskus nur herbo?“

Sankta Francisko: „Jes, Sinjoro. Ili eĉ suferas kaj laboregas pro tio dum plantado. Ĉiu printempo ili enmetas en grundon artefaritajn sterkaĵojn kaj per industriaj kemikaĵoj ekstermas aliajn plantojn, kiuj en herbejo aperus.“

La Dio: „Printempaj pluvoj kaj varmo certe kaŭzas, ke la herbo bone rapide kreskas. Tion certe homoj deziras.“

Sankta Francisko: „Ŝajnas, ke ili ne estas feliĉaj, Sinjoro, ĉar kiam la herbo iom komencas kreski, ili falĉas ĝin, ofte eĉ dufoje semajne.“

La Dio: „Ili falĉas kaj sekigas por fojno?“

Sankta Francisko: „Ne, Sinjoro, plejparte ili pakas la herbon en sakegojn.“

La Dio: „En sakegojn? Kial? Ĉu por vendi kaj profiti?“

Sankta Francisko: „Ne, Sinjoro, ili pagas por forporto.“

La Dio: „Klarigu al mi! Ili sterkas por kresko kaj kiam estas la herbo kreskinta, ili falĉas kaj pagas, por ke herbon oni forportu?“

Sankta Francisko: „Jes, Sinjoro.“

La Dio: „Tiu tribo estas certe kontenta, kiam ni somere ŝtopiĝas pluvon kaj enŝaltas varmegon. Tio haltigas kreskon de herbo kaj ilia laboro ne estas tiel pena.“

Sankta Francisko: „Eble vi ne kredos, Sinjoro. Kiam la herbo ĉesas kreski, ili rapide uzas tubojn por akvumi kaj pagas monon pro akvo, por ke povu daŭrigi falĉadon kaj forigon de falĉaĵoj.“

La Dio: „Tia stulteco! Almenaŭ ili lasis al si arbojn. Tio estis de mi vere bona ideo krei ilin. Printempe estas sur arboj folioj por beleco, somere por ombro. Aŭtune la folioj falas kaj faras naturan kovrilon por teni malsekon en la grundo por sekurigi arbojn kaj arbustojn ankaŭ kontraŭ frosto. Eĉ pli, la folioj servas kiel estonta sterko. Tio estas natura ciklo de vivo.“

Sankta Francisko: „Preferu sidiĝi, Sinjoro! Tiuj homoj kolektas foliojn en grandajn amasegojn kaj pagas pro forporto.“

La Dio: „Strange, strange...Kaj kion oni faras por protekti radikojn de arboj kaj arbustoj kontraŭ frosto kaj sekeco?“

Sankta Francisko: „Ili aĉetas ion en sakegoj, nomita „mulĉo“ kaj disŝutas ĝin ĉirkaŭ arboj kaj arbustoj.“

La Dio: „Kaj de kie ili akiras tiun ĉi „mulĉon“?“

Sankta Francisko: „Ili faligas arbojn, kaj el ili oni fabrikas tiun ĉi „mulĉon“.“

La Dio: „Francisko, ĉesu! Tiaj frenezaĵoj! Mia kapo doloras! Sankta Katarino, prizorgantino pri kulturo, kian filmon oni anoncas en televido?“

Sankta Katarina: „La filmon „Stulta kaj pli stulta“, sed Sinjoro, la filmo vere estas tre stulta.“

La Dio: „Mi preferas dormi, pri tio al mi rakontis jam Francisko.“



## Dio estas

1. ... **aero**, kiun ni spiras
2. ... **akvo**, kiun ni trinkas
- 3.... **forto**, kiun ni ricevas
- 4.... **patrino**, ĉiam kun malfermitaj brakoj
- 5.... **patro** , kiu zorgas kaj gardas homajn infanojn
- 6... **juĝisto**, kiu juste decidas
- 7.... **amiko**, kiu neniam perfidas kun kiu ni neniam misiras
- 8.... **instruisto**, kiu tago post tago donacas lecionojn, sed ankaŭ ekzamenas
- 9 .... **amanto**, kiu ĉirkaŭbrakas nin en plej malfacila tempo
10. .... **kuracisto**, konstante resaniganta niajn korpojn kaj niajn animojn
- 11.... **haveno**, kun savŝipo por la vojo el mallumo al lumo
- 12.... **lumo**, kiu brilas kiel lumturo de nia vivvojo
- 13.... **racio**, kiu venas en ninajn pensojn
- 14.... **roko**, kiu povas ĉiam apogi nin
- 15.. **senfino**, kiu nin ĉirkaŭas en ekstera kaj interna universo
- 16 .... **vero**, pri kiu ni neniam dubas
- 17.... **ora fiŝo**, kiu plenigas niajn dezirojn
- 18.... **kareso** dum doloro
- 19.... **kiso** dum ĝojo
20. ... **aplaŭdo** dum sukceso
- 21.... **reĝisoro** de nia vivrakonto
- 22.... **pado**, laŭ kiu ni iras
- 23.... **amo**, kiu nin konstante dorlotas
24. ... **vivo**

**Al Dio, ni dankas pro ĉio**

Preparis Blanka Hužerová el Mladá Boleslav.

o-o-o-o

## **Intervjuo kun nia gasto el Francujo – Bruno Henry el E-Klubo en Thionville je la 13-a de julio 2010 en klubejo de la E-Rondeto en Mladá Boleslav**

Demandis ĵurnalisto Pavel Svačina el „Boleslavský deník“ (loka tagĵurnalo en Mladá Boleslav).

1. Vi ĵus revenis el Ukrainio, kiel en tiu lando fartas Esperanto, ĉu oni interesiĝas pri ĝi?

La anoj de Jalta klubo aranĝis „tagoj-noktoj“ sur la kabo Takhankut sur Krimeo. Kunvenis pli ol 50 ĉeestantoj, grupo el malproksima Siberio, germano, slovako, ĉeĥo, poloj ktp. Mi estis sola franco. Venontjare oni la aranĝon ripetos kaj oni antaŭvidas pli da partoprenantoj kaj ili intencas aranĝi venontjare en Kijevo Junularan tutmondan kongreson. En Jalta oni instruas la lingvon en kursoj, preparas teatraĵojn. Ili estas tre aktivaj.

2. Kiel plaĉas al vi nia urbo Mladá Boleslav kaj kion vi opinias pri niaj esperantistoj?

Mi jam vizitis Mladá Boleslav kelkfoje. Kun gvidantino de loka rondeto mi lernis la lingvon en la jaro 1992 en Poprad en Slovakio. La urbo plaĉas al mi tre, bonajn rilatojn mi havas ankaŭ kun aliaj anoj de la rondeto, ni havas konstantan retligon. Kun mia grupo el Thionville ni partoprenis seminarion en Skokovy. Tiuj seminarioj havas bonan tradicion. Plaĉas al mi, ke lokaj esperantistoj estas junaj.

3. Sinjoro Henry, kial vi elektis Esperanton, ĉu vi pensas, ke ĝi havos estontecon?

Pri la Esperanto mi aŭdis en baza lernejo kaj pli poste, kiam mi estis 36-jara mi aŭskultis prelegon de virino el Malajzio kaj mi aŭdis la lingvon. Tio plaĉis al mi. Ĉar mi ŝatas vojaĝi, do mi provis la lingvon lerni. Post 6 monatoj mi jam renkontis esperantistojn dum miaj vojaĝoj. En Esperanto mi sentas estontecon, ĉar multaj junaj homoj uzas ĝin, precipe interrete. En Brazilo, Ĉinio oni instruas la lingvon en altlernejoj. Ekzistas „Monda Turismo“ en Pollando, kiu organizas vojaĝojn sur mondo kaj ankaŭ al mondaj kongresoj, kiuj okazas ĉiujare en alia granda urbo. Ĉijare okazas en Havano en Kubo, venontjare en Danio, poste en Hanojo en Vjetnamio.

4. Laŭ viaj spertoj, ĉu estas en la mondo intereso pri Esperanto?

Multaj homoj scias pri Esperanto nenion, aŭ havas tute fuŝajn imagojn – artefarita lingvo, sen kulturo ktp. La vero estas tute alia.

5. Ĉu laŭ via opinio havas Ĉeĥa respubliko kondiĉojn por plivastigo de Esperanto?

Dependas de homoj kaj politikistoj.

Interpretis Jindřiška Drahotová.

## Mia blogo pri Esperanto

**Béla Kovacs, Hungario**

Mi estis ankoraŭ infano, kiam mi renkontiĝis kun Esperanto. Tiam mi sciis pri ĝi preskaŭ nenion. Ĝi estis hazarda renkontiĝo, kiel ĉio en la vivo. Se mi ne estus irinta al nia vilaĝa biblioteko, nun mi ne sciis ĝin.

Ne mi elektis Esperanton. Laŭ mi ĝi elektis min.

Strange, ĉu ne? Sed tio estas la fakto.

De tiu ĉi tempo mia esperantistiĝo estis ne haltigebla.

Post tiu tago mi plurfoje ĉesis mian kontakton kun la Zamenhofa lingvo, sed ĉiufoje ĝi retiris, kaj ne lasis foriri. Ia nevidebla forto tiris, eĉ tiregis min al ĝi. Iutage mi sentis, ke mi estas katenita kaj ke mi ne povas liberiĝi de ĝia brakumo.

Eble nun vi pensas, ke mi plendas.

Ne amiko, mi ne plendas. Por mi ĉi lingvo estas ege grava. Ĝi difinas mian ĉiutagan vivon. Se mi vekiĝas mi tuj pensas pri ĝi esperante mi travivos tiun admirindan momenton, kiam ĝi vaste estos uzata kaj ĝi plifaciligos la homan kontakton sur ĉiu tereno.

Mi scias, Esperanto havas malamikojn, kiuj tage kaj nokte klopodas forigi ĝin el la cerbo de la homoj. Tiuj ĉi homoj fabrikas stultajn argumentojn kontraŭ ĝi. Bedaŭrinde ilin kredas simplaj homoj kaj ili ne vidas la veran sencon de tiu ĉi grandioza lingvo. Mi jam plurfoje decidis balaii el la kapoj tiujn multajn stultaĵojn kaj muĝante kriegi al ili: Esperanto estas por vi.





## La knabeto kaj la ponto

Béla Kovacs, Hungario

Maljunulo iris sur la riverbordo kaj li neatendite ekvidis knabeton, kiu konstruis ion.

-Kion vi faras? - li demandis mire.

-Mi konstruas ponton por ke oni povu iri sekpiede al la alia bordo.

-Bela revo – rimarkis la maljunulo – Junaĝe ankaŭ mi deziris fari tion.

-Ĉu vi sukcesis finkonstrui la ponton? - vigliĝis la knabeto.

La maljunulo ekridetis kaj larmokule diris:

-Mi estis primokita kaj mi ĉesis la konstruadon. Nun jam mi ege bedaŭras. Oni ne lasu la junaĝajn songojn. Mi scias certe, ke baldaŭe venos alia homo, kiu primokos vin. Tio estos tre malbona. Vi sentos kiel via forto forlasos vin kaj tiu homo ekprovos konvinki vin, ke ĉiu songo estas vana penado. Tiu ponto neniam pretiĝos. Sed ne aŭskultu lin. Lerne el mia ekzemplo. Ho, se mi denove estus junulo! Mi ĵuras, ke tiu ponto estus konstruita.

-Oĉjo! - ekkriis la knabeto – ni konstruu kune la ponton kaj ni duope povos konvinki la dubantojn, ke la songoj realiĝos, se oni persiste kredas ilin.

La ideo ege plaĉis al la maljunulo. Li senvestis sian mantelon kaj kune kun la knabeto ekkonstruis la ponton.

Vane venis primokantoj, ili ne povis konvinki ilin, ke tiu ĉi ponto neniam konstruiĝos. Ilia persisteco kaj la komuna forto montris al la mondo, se oni tre volas ion, tiam la songoj realiĝos.

Jam la maljunulo ne vivas. Li mortis antaŭ ol la ponto estis konstruita. Tamen li mortis ridetante, ĉar revenis la maljunaj songoj, kiujn li al la knabeto helpis plenumi.



## **Rakonto pri honestaj kaj nehonestaj homoj, niaj kuncivitanoj**

Okazis, ke iun tagon venis al razisto ĝardenisto por tondi. Kiam la tondisto faris sian laboron, demandis la ĝardenisto pri la pago. La razisto respondis: „Tiu ĉi semajnon mi servas senpage al kuncivitanoj. Mi ne akceptos monon.“

La ĝardenisto dankis kaj foriris. La duan tagon la razisto trovis antaŭ sia oficejo bukedon de rozoj.

La sekvan tagon venis bakisto por razi kaj tondi. Kaj okazis la samo: „Mi servas al kuncivitanoj, dum tiu ĉi semajno. mi ne povas akcepti monon.“

La sekvan tagon aperis ĉe razisto telero kun kukoj kaj karteto kun danko.

La sekvan tagon, matene venis parlamentano por peti servon de razisto kaj okazis la samo. La parlamentano dankis a ĝoje foriris.

La sekvan tagon matene antaŭ oficejo de razisto staris 12 parlamentanoj kaj ĉiuj volis esti tonditaj senpage.

Karaj amikoj, tio ĉi estas nura ilustraĵo de grava diferenco inter ordinaraj civitanoj kaj oficistoj de ŝtata regado, kiuj perdis rilaton al ordinara vivo de siaj kuncivitanoj,. Ili estas tiuj, kiuj rajtas gvidi nin en nia lando...?.

Anonimo el ĉeĥaj internetaj paĝoj, 2011.

JoDo.

## **Renkontiĝo en Skokovy**

Eva Pánková, Ĉeĥio.

Kvieta, bela aŭtuna tago kun blua ĉielo kaj amaso de orkoloraj folioj. Preskaŭ ĉiuj partoprenantoj de oktobra esperanta renkontiĝo preferis malkovradi belecon de Bohemia paradizo.

Mi elektis plenplenan potegon de verda teo kaj horetan de soleco kaj azilo en ĝardeneto de pensiono. Miaj okuloj fermis kaj vizaĝon varmigis suno kaj karesis pura aero. Mi komencis taksadi kio sukcesis, kio malpli kaj kio tute fiaskis.

Apud mi iu diris: „Bonan tagon.“

Mi malfermis okulojn. Ĉe apuda tableto sidis simpatia, grizhara, viro kun barbo. Eble mi jam vidis lin ie...

„Kiu vi estas?“

„Jes, mi estas esperantisto,“ li respondis trankvile.

„Sed vi ne partoprenas nian renkontiĝon.“

„Ne. Mi sidis ĉe fenestro de klubejo kaj aŭskultis. Jam multaj jaroj pasis, kiam mi kreis la lingvon kaj poste verkis lernolibron. Hodiaŭ mi hazarde preteriris kaj vidis verdan flagon sur la pensiono ESPERO. Mi scivoliĝis kaj kun ŝaŭma biero en loka restoracio mi aŭskultis.“

„Domaĝe, ke vi ne alvenis inter ni, ĉiuj ĝojiĝus.“

„Sufiĉis por mi aŭdi vin. Multe da tempo vi dediĉas al gramatiko, nur mi rimarkis, ke aperis nebona kutimo, nune ĝenerale disvastita, ne aŭskulti unu la alian.“

„Sed ĉiuj aŭskultas kaj helpas unu al la alia kaj kiam iu misas aŭ eraras – „  
„Nu, vi korektas pli rapide ol oni finas la frazo kaj la parolanto finigas la ideon, ŝajnas ke la ideo interesas neniun.“

„Sed, kiam oni faras ion, kio valoras, valoras ankaŭ, ke tio estu preciza. Kaj erarojn nuligi oni devas tuj, ol ili al kutimiĝos.“

„Jes, vi pravas. Sed Esperanto ne estas nur gramatiko kaj prononcado. Esperanto estas ĉefe pri amikeco kaj toleremo. Vera esperantisto neniam ironie rompas parolon de la alia. Ĉiuj rajtas havi sian spacon. Pardonu, mi ne venis prediki mi ne volis esti teda. Ĉi tie estas bele. La pejzaĝo regalas okulojn, estas plena de historio, homoj estas agrablaj. Mi vere ĝojeĝis, ke post tiom da jaroj Esperanto vivas kaj se ni estos sanaj, eble ni denove ĉi tie renkontos.“

Eva Pánková - amikino de Esperanto

Mladá Boleslav, Ĉeĥio

Helpo kun traduko al Esperanto Jindřiška Drahotová

La rakonton ni sendis al Jekaterinburgo en konkurson kaj ĉar ĝi plaĉis al rusoj, ili petis permeson por uzi la tekston por realigi teatraĵon dum solena fino de la konkurso.



### **Lulkanto: Dormu milde**

Suno moŝta post minuto,  
Diofana gemrubeno,  
Riverencos kun saluto  
Al la nokta suvereno.  
Luno brila el sateno  
Jam arĝenta en ĉielo.  
Ĉio mutas en sereno.  
Dormu milde, brilas stelo.  
Infanetoj dum balbuto  
Time ploras sen ĉagreno  
Trankviligas ilin fluto  
Kaj fabelo pri delfeno.  
Kaj malantaŭ la kurteno  
Kvankam regas la malhelo,  
Ili kuŝas sur kuseno.  
Dormu milde, brilas stelo.

Nek diskuto, nek disputo,  
Foren pluas la promeno  
En kupeo aŭ kajuto  
Trans la monto ĝis haveno.  
Morgaŭ floros la mateno,  
Belos kiel akvarelo,  
Sed silente nun sen ĝeno  
Dormu milde, brilas stelo.

Teksto: Marcelo Redoulez, muziko de la kreaĵo (kiu ne estas aŭdebla nun en libro, bedaŭrinde): Nanne Kalma, muzikistaro.: Kajto./ [Lenyvargas@gmail.com](mailto:Lenyvargas@gmail.com)



## Urĝa helpo

Pavel Tomeš, Sedmička mf, numero 19, jaro 1, aŭgusto 2009

Kion mi vere ne volus fari, estas efektiviĝi urĝan helpon al iu. Unu el la kialoj estas mia bofrato. Li estas kirurgo kaj asertas, ke oni veturigas en hospitalojn tro multe da homoj, spite oni povus solvi katastrofojn sur la loko trankvile eĉ neprofesiuloj. Dum liaj vizitoj ĉe ni li instruas al mi lecionojn pri urĝa helpo por progresantoj.

Laste li ekzemple tre detale lecionis al mi pri „koniotomio“ - simpla tranĉo de gorĝo al hazarda preterpasanto, al kiu subite edemiĝas lango kaj ŝtopas spirtubojn. Ankoraŭ hodiaŭ mia adampomo ne revenis al ĝusta loko, ĉar la bofrato montris al mi akurate kiel mi devas per akra tranĉileto tranĉi kaj „ion enŝovi“ en traĥeon, por ke la malfeliĉulo povu spiri.

La bofrato instruas al mi iom post iom kiel solvi diversajn gravajn akcidentojn kaj akutmalsanojn sen zorgo pri miaj traŭmoj. Dum lasta vizito abrupte demandis: „Kion vi faros, se venos al vi viro kun „pneŭmotorako“? Mi iom pensis: „Ĉu mi donu al li ian ŝmirajon kaj Aspirinon?“ mi provis.

„La homo, kun brusto kiel balono, ne havas humoron por ŝercado!“ ekkoleris la bofrato. „Post akcidento al la homo amasiĝas en brusto aero, presigas koron. Vi devas helpi! Do, kion vi faros?“

Mi ne sciis. Mi volis levigi ŝultrojn, sed post pasinta leciono „kiel reveni luksacitan ŝultron reen“, mi ne sukcesis.

„Vi drenos pleŭran kavon!“ diris la bofrato.

„Kion mi faros?“

„Nu vi prenos ŝraŭbilon kaj enigis ĝin sub tria ripo kaj simple forblovos la homon, klare?“

„Ne, tion mi ne faros!“

La bofrato akre rigardis min sekundon kaj poste diris: „Ne? Bone pripensu, ĉar okaze de nefaro de urĝa helpo venas puno ĝis 3 jaroj en prizono!“

Tradukite de J. Drahotová kun autora permeso.



## Pri arboj

J.Drahotová

Vespere mi dum raportado de eventoj en televido neprecize aŭskultis ion pri propono faligi arbojn, starantaj ĉe vojoj, ĉar ili kaŭzas multajn averiojn de aŭtomobiloj, kiuj kolizias pro ekfrapo al arboj. Tia aranĝo ĉesigus damaĝojn de posedaĵoj kaj vivoj. Sed ni vespermanĝis kaj pluraj eventoj estis same maltrankviligaj, kaj laŭ mia sukcesa maniero laŭ rekomendo sur afiŝo en mia laborejo en malsanulejo kontraŭ anima forbrulo: „*Problemo, kiam aperus, mi solvas ĝin tuj, se mi ne povas solvi ĝin, ne temas pri problemo, sed pri sensencaĵo*“, mi lokigis la informon ien flanken en mian cerbon.

Post kelkaj horoj mi enlitiĝis. kaj ekdormis.

De tempo al tempo mi sonĝas. Tiu ĉi sonĝo estis nekredeble klara kaj mi memoris ĝin post la vekigo. Mi estis fruktarbo en aleo. La arboj kunvenis kaj diskutis pri la faligo. Mi laŭte parolis. Komune ni prilaboradis kontraŭproponon: forigon de aŭtomobiloj, ĉar ili movas kaj povas eviti nin kaj ni tiun eblon ne havas, krome ni prizorgas ekvilibron en la naturo, kontraŭ aŭtomobiloj, kiuj la naturon damaĝas. Pli klare ol Suno estis, kaj nur stultulo dirus malon, ke mankas demokratio.

Mi vekis je la kvara horo kaj la sonĝon priskribis. Nu, legu! Io estas grava pri arboj....

## Legendo pri fino de paganoj en la regiono Mladá Boleslav

Lastaj paganoj en Bohemio vivis en slavaj setlejoj Březovice kaj Skalsko. En tuta lando dum tempo de Sankta Venceslao rapide disvastiĝis kristanismo. Sed en la regiono de Boleslav homoj ne volis rezigni pri siaj dioj kaj superstiĉoj. Pagana komunumo plifortiĝadis per pelataj paganoj el sudo, okcidento kaj nordo de Bohemio. Paganoj komencis persekuti novajn konfesantojn de kristana kredo. Kiam montriĝis la strebo venki ilian paganecon per forto de kredo vana, la praga princo Boleslav la Dua, nomita Pia, intervenis milite.

Militaj trupoj el vilaĝoj Hrušov, Předměřice, Kovář kaj Kluky en sangaj bataloj finfine dispelis la travivantajn paganojn al proksimaj arbaroj laŭ la rivero Jizera.

Post la forpelo de ĉiuj paganoj el la regiono ordonis la princo, por timigi ĉiujn malamikojn de kristanismo, konstrui fortan burĝon ĉe kunfluo de rivereto Klenice kaj rivero Jizera. Ĝi estis nomita Boleslavo Juna, ĉar sude jam staris urbo Boleslavo – loko, kie estis mortigita princo Sankta Venceslao fare de patro de princo Boleslavo la Dua Pia. La patro de Boleslavo la Dua estis Boleslavo la Unua nomita Terura, pli juna frato de princo Sankta Venceslao – patrono de bohemia lando.

## Legendo pri la fera bastono

Foje diablo volis prirabi rabistojn, sed la banditoj defendis sin kaj forpelis lin. Matene la rabistoj trovis bastonon kun surskribo: „Kiu la bastonon levos, tiu estos feliĉa.“ La bastono mem trifoje batadis teron en la loko, kie estis kaŝita iu trezoro.

La rabistoj fine estis kaptitaj, enkarcerigitaj kaj la bastono konservita en proksima burgo „Dražice“.

Homoj kredis, ke la diablo nokte venadas, prenas la bastonon kaj en infero per ĝi torturas pekintajn animojn.

## Legendo la pri fama loka rabisto Václav Babinský

Václav Babinský naskiĝis en la jaro 1796 en la urbo Litoměřice. Lia aventurema karaktero venigis lin al libervola militservo. Li enamiĝis al malriĉa Liduška kaj por ŝi unuan fojon li ŝtelis armean kason. Post drama epizodo kaj frua morto de Liduška, Babinský kun amiko Lojza Hofman kaj komune kun fratino de Lojza fondis rabistan bandon. Al la bando venis dizertintaj soldatoj kaj aliaj aventuremuloj.

Babinský fariĝis la plej fama ĉeĥa rabisto, pri kiu oni legis en ĉeĥaj kaj germanaj ĵurnaloj. Li regis en regionoj de la urboj Litoměřice, Mělník, Bezděz, Mladá Boleslav eĉ alie. La fino de lia rabista kariero okazis per perfido de unu el liaj amatoj en la jaro 1835. Survoje al Mladá Boleslav li mortigis germanan komerciston, poste li intencis fuĝi al Germanio, sed li estis kaptita. La tribunala proceso daŭris preskaŭ kvin jarojn, dum kiu la rabisto provis kelkfoje fuĝi, sed sensukcese. En majo 1841 li estis kondamnita por 20 jaroj en severan karceron en urbo Brno - Špilberk. Post pasigo de la puno li vivis reston de sia vivo en la monaĥinejo en Řepy kiel ĝardenisto, tre ŝatata de monaĥinoj. Li mortis en la jaro 1879.



## Legendo pri boleslava buĉisto

Estis post malfeliĉa batalo sur „Blanka monto – Bílá Hora“ en la jaro 1621. El Prago haste fuĝadis trupoj de la reĝo Friedrich el Palatinato por savi sin el Ĉeĥio.

La plej ĉefa kortestrino de la reĝino Elizabeth Stuart, sinjorino el Reitzenstein vojaĝis al Saksio tra Mladá Boleslav kun sia akompanaro. La urbo estis plena de fuĝanta soldataro kaj

homoj kaj tial ne eblis trovi por la germana nobelino eĉ la plej modestan lokon por ripozi kaj tranokti. Ŝi senkonsile vagis tra timoplena urbo ĝis ŝi eksciis de iu gastejmastro pri iu privata domo, kiu ne estas loĝata, sed en kiu de tempo al tempo fantomumas kaj neniu kuraĝas tie tranokti. La novembra vetero ne estis favora kaj la saĝa kaj pia sinjorino el Reitzenstein decidis en la mistera domo enloĝiĝi kaj spiritojn superigi. La forlasita domo estis eksposedaĵo de la loka buĉisto, kiu antaŭ nelonge vidviĝis kaj nun li havas novan fianĉinon.

La sinjorino loĝiĝis kun siaj servistinoj en iama dormoĉambro de la buĉisto. Ŝi ordonis bruligi multe da kandeloj kaj kantante piajn kantojn ŝi atendis horon de la spiritoj. Kiam batis la 11-a horo, kun bruo malfermiĝis pordo de apuda ĉambrego kaj al timigitaj virinoj proksimiĝis virina staturo kun bandaĵita kapo. La sinjorino kun tremanta voĉo demandis: „Kiu vi estas kaj kion vi deziras?“ La fantomo respondis: „Mi estas posedantino de tiu ĉi domo. Mi sukcesis nek per junaĝo, nek per beleco, nek per riĉeco alligi koron de mia edzo. Li amas alian virinon, kaj li volas edziĝi al ŝi. Min li sekrete mortigis per buĉista hakilo. Al la homoj li diris, ke mi ĵetis min el fenestro, ke mi mem mortigis min. Mi estis entombigita kaj neniu scias pri la krimo.“

Poste la fantomo prenis de la sinjorino oran ringon, demetis la bandaĵon el kapo kaj enmetis la ringon en vundon. Ankoraŭ diris: „Malfermu mian tombon, tie vi trovos la ringon“.

Frumatene la sinjorino postulis sekretan pridemandon ĉe urbestro kaj skabenoj de la urbo. Ili komence ne volis kredi la rakonton, ĉar riĉa buĉisto estis unu el la plej estimataj boleslavaj loĝantoj. Tamen post insistado oni ordonis la tombon de la malfeliĉa viktimo malfermi kaj esplori.

Kaj vere, al mirego de ĉiuj, estis en la profunda vundo de la kapo trovita la belega ringo kun signo de la sinjorino el Reitzenstein.

Poste oni agis senprokraste. La buĉisto estis kaptita survoje al preĝejo kun sia fianĉino, antaŭ okuloj de edziĝfestaj gastoj kaj muzikistoj. La kulpulo unue mensogis, sed ne longe. La urbestro ordonis alporti ĉerkon kun mortita virino kaj buĉisto falis senkonscie teren.



Mi konsideras, ke la Grekio nuntempe ne furoras, sed ekzistis en tiu lando en la pasinteco riĉa saĝeco. Ja, antikvaj grekoj helpis al mi nomigi aferon, kiun mi renkontas fojfoje kaj al kiu mankas ia nomo. Do, pro tiu sennomeco la afero ŝajnas al mi danĝera.

En antikva Grekio la esprimo „tabula rasa“ signifis pura, senskribita aŭ nerobotita disko. Idee ĝi esprimas ion originalan, netuŝitan per iu ajn sperto.

Mi ne povas refuti al mi imagon, ke multaj homoj havas kapablon teni tiun mankon de spertoj dum tuta sia matureco – ili posedas gravan fenomenon – tabulorasismom. Tiel iu, kiu pri io scias grandan nenion, parolas pri la io elokvente kaj konstruas konkludojn kaj konvinkigas aliajn. Tiujn nerobotitajn diskulojn oni povas renkonti en tramoj, oficejoj, dum parkado de aŭtoj, en vendejoj, ktp. eĉ antaŭ propra domo. Neniam vi scias, kiam ili vokos kontraŭ vi policistojn. Ili ĉiam pravas kaj ne timas sian veron disvastigi. Ili firme staras en sia opinio, malgraŭ, ke ili scias pri esenco de afero nenion. La diskuto ne eblas, ĉar kontraŭ argumentoj ili reagis per larĝa rideto aŭ komencas rakonti pri iu okazaĵo el ilia propra vivo. La rido ne malaperas, se vi starigas faktojn. Ilia forto estas enorma. Ili ofte atakas kaj eĉ renoma intelektulo povas esti gvidita en situacion, kiam tiu stultulo farigos el li stultulon. Plu la problemo altiĝas, ĉar ne ĉiuj tablorasistoj estas tutaj kretenoj kaj sukcesas akiri seĝojn en gravaj kaj decidigaj lokoj kaj ŝate decidis.

La plej malbona afero estus neglekti pri tiuj tabulorasistoj. Kontraŭ tiuj nerobotitaj diskuloj oni devas batali.

Sed kiel?

Senĉese!

Sedmiĉka MF 48/2010

Traduko JoDo

### Vintra okazaĵo

Ĉie estis blanke kaj ege frostis. Kion ni matene ekvidis estis malnova benko, kovrita per neĝo. Belega rigardo! Sed subite ni falis sur benkon. Kaj...kien li foriris? Kial li lasis nin ĉi tie? Hola, hola! Prenu nin kun vi! Kion vi faros sen ni? Vi bezonos nin! Malfrue! Li ne aŭdis nin.

Ĉirkaŭ eksilentis. Ni restis solaj. Frostis. Ni meditis, malgajis. Venis maljuna viro. Li komencis nin rigardi, prenis en manon. Eble ni havos novan sinjoron, ni pensis. La sinjoro provis nin surmeti, sed ni ne plaĉis al li. Li post momento demetis nin sur benkon kaj foriris. Kion fari? Ni devis atendi.

La tempo pasis kaj strataj lampegoj eklumis.. En mallumo ni estis eĉ pli belaj. La nokta frostado kovris niajn vitrajn korpojn. La lumo de lampoj briligis kristalojn sur nia korpo kiel brilantoj. La nokto estis longa. Kio okazos en nova tago?

Ĉu vi divenis la objekton?

Jindřiška Drahotová, Ĉeĥio (laŭ materialoj por ludi en rondetoj)

## **Realo vs. Deziro**

„*Deziro iĝas plano, kiam ekhavas limdaton*” (J.Vajs)

Deziro restos nur deziro, se ne transformiĝos en planon, kiu sekve povas realiĝi. Por realigi planon necesas do unue deziro. Deziroj kutime ne mankas en nia movado – eĉ male – ili abundas kaj ofte kontraŭas unu la alian. Tasko de gvidantoj do estas ofte unue bone pritaksi unuopajn dezirojn, kiujn eblus danke al bonaj planoj realigi. Krome oni atendas de la gvidantoj ĝuste kreadon de bonaj planoj, por povi realigi iun certan deziron, transformi ĝin pere de tiu plano al realo. Ne ĉiam facila deziro povas ankaŭ facile realiĝi. Kaj male – ne ĉiam malfacila deziro bezonas malfacilan realigon. Esperantistoj ofte devis kaj devas alfronti „krudan realon“, kiu ne tro kongruas kun iliaj deziroj, idealoj, planoj. Tial la vorto „Esperanto“ estas ege trafa por la uzantoj de Internacia Lingvo.

Konklude al la demando de la titolo: „Ĉu la Esperanto-movado pretas por la 21-a jarcento?“, ni povas respondi: „Jes kaj ne“. Jes – en la senco, ke ni havas eblojn kaj rimedojn, kiujn nia movado bezonas. Ne – en la senco, ke ni daŭre ne uzas tiujn eblojn tiom, kiom indus kaj kiom la Lingvo Internacia de D-ro Esperanto meritis.

Tio, kio pleje necesas estas emo kaj kapablo transformi niajn dezirojn al planoj, kiuj sekve povas realiĝi. Ne sufiĉos do resti esperanta, ĉiu el ni, esperantistoj iĝu ankaŭ aganto kaj realiganto. Por povi plene ĝui nian Esperanto-kulturon, lingvon, komunumon, movadon – laŭ la ebloj kaj manieroj de la 21-a jarcento.

*Peter Baláž - E@I kunordiganto el la blogo de E@I, <http://blogu.ikso.net>*

## **Versaĵo de ukraina humoristo Stepan Olijnik**

En granda rivero knabino dronadis  
El bordo amaso ŝin streĉe rigardis.  
La homoj nervumis: ja, kio okazos?  
La povra knabino sence ffordronos!  
Subite bravulo en akvon ensaltis,  
Kuraĝe kaj noble knabinon li savis.  
Nu, kia kuraĝo - amaso triumfis -  
En akvon profundan, malvarman li ĵetis!  
Dum li kaj knabino la vestojn ŝanĝadas,  
La homoj malsekan, tremantan lin laŭdas.  
Bravulo respondas: nur devon mi faris,  
Floreton belegan senpense mi savis.  
Meritas min gloro, dekoro, afablo,  
Sed kiu porkaĉo min puŝis al akvo?

> Iu ajn povas uzi la tradukon por instruado, enmeti en iun ajn libron..  
> Amike  
> Ivano Kossey

## La verda movado

Nicole, Aŭstralio

Mardo 31a de Majo 2011 je 08:57 tradukite el la angla

Ĉe supermerkato kasisto demandas al maljunulino ĉu ŝi alportis ŝtofajn sakojn ĉar plastaj sakoj ne estas bonaj por la medio. La maljunulino pardonpetas, ŝi forgesis alporti sakojn “Ni ne havis verdan movadon kiam mi estis juna”

La kasisto respondas “Tial ni nun havas tiom da problemoj, ĉar la pli frua generacio ne respektis la medion”

Li iusence pravas la generacio de niaj geavoj ne havis verdan movadon.

Tiam ili redonis la botelojn de lakto kaj aliajn botelojn al magazenoj. La boteloj estis lavitaj kaj replenigitaj. La samaj boteloj estis uzataj dum ege longa tempo. Ne ekzistis politiko de reuzado, oni tute normale reuzis.

Ili tiam ne havis verdan movadon.

Dum tiu tempo personoj uzis ŝtuparojn kaj ne liftojn. Ne ekzistis rulantaj ŝtuparoj. Ili piediris al la magazenoj kaj ne uzis maŝinon ĉiun fojon kiam ili devas piediri kelkajn metrojn.

Ŝi pravas, ili ne havis verdan movadon kiam ŝi junis.

Ŝi lavis la vindotukojn de siaj beboj kaj ne forĵetis ilin. Ŝi uzis la venton kaj sunon por sekigi la vestaĵojn, ne elektro-englutantan maŝinon. Infanoj kontentis surmeti la malnovajn vestaĵojn de pli aĝaj gefratoj aŭ gekuzoj kaj ne postulis tute novajn vestaĵojn.

Sed la maljunulino pravis, ili ne havis verdan movadon.

Tiam ili havis nur unu televidon kaj unu radioaparaton en la hejmo, ne televidon en ĉiu ĉambro. Krome la televidilo estis malgranda, ne la grandeco de futbaltereno.

En la kuirejo ili miksis permane, ili ne uzis elektran aparaton por plej etaj taskoj. Por enpakigi rompiĝemajn varojn ili uzis ĵurnalojn kaj ne plaston kun bobeloj. Ankaŭ frititaj terpomoj kaj fiŝaĵo estis en ĵurnalo kaj ne en plastaj ujoj.

Tiam ili eĉ sukcesis tranĉi herbejon sen uzi benzinon. Tio postulis iom da homa energio, sed tiel ili ne bezonis uzi gimnastikejon kun elektraj aparatoj por ekzerci.

Sed ŝi pravis, tiam ili ne havis verdan movadon.

Ili trinkis akvon el krano kaj ne bezonis botelojn de akvo kaj kartonajn tasojn. Ili remetis inkon en la skribilojn kaj ne aĉetis novajn skribilojn ĉiun semajnon, ili anstataŭis la klingojn de raziloj, kaj ne forĵetis la tutan razilon kiam la klingo ne plu estas akra.

Sed ili ne havis verdan movadon tiam.

Tiam personoj uzis publikan transporton kaj infanoj biciklis al la lernejo kaj ne atendis ke la gepatroj servu kiel taksio. Ili ne bezonis komputilon por trovi la plej proksiman picovendejon.

Ĉu ne estas stulte, ke la nuna generacio riproĉas al la maljunuloj ke ili ne sufiĉe atentis pri la medio kaj ankoraŭ ne havis verdan movadon?

### **Primokado: oliv-arbo kaj fig-arbo**

Nicole, Aŭstralio la 6an de aŭgusto 2011, 22:17

Jen iom libera adapto de fablo de Ezopo

En vintro, olivarbo primokis figarbo, "Tra la tuta jaro, mi estas ĉiam verda kaj bela, sed viaj folioj velkas kaj falas en vintro. Kaj vi estas bela nur somere."

Ĝuste kiam ĝi fanfaronis, ekneĝis kaj falis dikaj flokoj. La neĝflokoj restis kaptitaj en la folioj de la olivarbo, la branĉoj fariĝis tre pezaj kaj multaj rompiĝis. Nun kun tre malmultaj restantaj branĉoj la beleco de la olivarbo malaperis. Kontraŭe la kalva figarbo ricevis nenian vundon de la neĝo.

Moralajo: bone atentu kiun vi primokas.

**Pensoj de Miroslav Horníček,**

ĉeĥa aktoro kaj popola filozofo

La saĝeco ne alvenas kun aĝo, la aĝo venas sole.

La dio amas ateistojn, ili ne ĝenas lin per siaj problemoj.

## **Miaj tri nemalmemoreblaj travivaĵoj kiuj ĉiuj estas iel ligitaj kun soldatoj.**

Zdenek Myslivec, Ĉeĥio

Kiam mi estis nur trijara, mi havis klaran deziron fariĝi kamentubisto kaj kiel la dua alternativo – soldato.

El la fenestro de mia avo mi ofte rigardis al la sinjoro kamentubisto, al lia persono tute nigra kun blanka ĉapeto, kiel li lerte per seriozaj movoj laboras.

Baldaŭ venis – post unu jaro – mia unua renkonto kun veraj soldatoj, kiujn mi ĝis tiu tempo konis nur el bildoj. Ili aperis surstrate proksime de nia domo. Nia registaro (1938) deklaris ne batali kontraŭ faŝista Germanio kaj ordonis demobilizacian – ĉesigi soldatarmean servon. Mi petis patrinon, ke ŝi iru kun mi renkonti soldatojn. Ŝi ne volis. Mi petis, petegis kaj ŝi finfine permesis al mi iri sole kaj mi kuraĝe iris.

En domo, kie armea aŭtomobilo haltis, loĝis familio kun tri filinoj. Mi nur memoras, ke soldatoj estis iel gajaj kaj kun knabinoj batalis per kusenoj. Oficiro staris apud kaj senverte rigardis la scenon. Kiam li min ekvidis, alpaŝis, ĉirkaŭbrakumis min kaj levis min. Nur post jaroj mi ekkomprenis la iaman situacion, ke tiu stranga gajo de soldatoj eble estis poststreĉo, kiam nia armeo staris kontraŭ forta povo kaj momento de fakto: hodiaŭ ni ne estos murditaj. Vizaĝo de la oficiro tamen estis malgaja, zorgoplena. Li komprenis konduton de la soldatoj, certe pensis pri estonteco de la nacio kaj tiu kvarjara bubo, kiu palpis liajn epoletojn.

La duan fojon okazis la travivaĵo en la jaro 1944, kiam mi vidis sukcesan atakon al germana aviadilo kaj ĉefe, kiam mi kun mia amiko trafis kvar eskapantajn rusajn militkaptistojn. Proksime de arbareto de mia avo, aranĝis iu viro el proksimeco sub roko kaŝejon, ĉar milita linio proksimiĝis. La bruoj de la kanonoj ŝajnis esti tute proksime. La urba oficejo raportis pri danĝero kaj rekomendis ne promeni en lokon malantaŭ de la tombejo, kie kutime vespere renkontadis diversaj homoj. Post tiu averto tien alvenadis homoj eĉ dumtage, ofte vestitaj per blankaj modaj “bombajky”<sup>1</sup>, eble por esti pli bona celo por kuglo. Kiam en vilaĝo aperis tiuj kvar rusoj, la najbaro loĝigis ilin en sian kaŝejon, anstataŭ propra familio. En tiu tempo loĝis en nia vilaĝa lernejo taĉmento de germana armeo Wehrmacht kaj en alia vilaĝo – Kopaně – taĉmento de armeo Vlasov. Dum mia vagado kun amiko tra arbaro la rusoj observis nin kaj kiam ni alproksimiĝis, ili tenis nin en kaŝejon kaj ni pensis, ke venis lasta horeto de nia vivo. Sed ili nur montradis al ni per manoj kio okazos al ni de flanko de germanoj, se ni denuncos ilin. Ili interesis pri agado de germana taĉmento en nia lernejo. Ni de tempo al tempo portadis al ili iom da manĝo, sed malmulte. Se ni estas nuraj, ili mortus de malsato. Ni mem havis malmulte kaj la panon ni akiradis per ŝanĝo je cigaredoj kun soldatoj de generalo Vlasov. Naskiĝis problemoj, kiam Viktor – rusa soldato – vundigis sian okulon. Veni al nia kuracisto ni timis, helpis akuŝistino. Aliaj rusoj nomiĝis: Sergej – stiristo de pafita aviadilo, Vasil kaj Michal.

Komence de majo post unu jaro (1945) jam germanoj kaj rusoj de Vlasov estis

for. Partizana taĉmento el proksima vilaĝo Vlastiboř diversmaniere agis kaj kontraŭ ĝi alveturis germanaj soldatoj el la urbo Semily al nia vilaĝo. Du kirasitaj veturiloj plenaj de soldatoj malrapide veturis tra valo kaj poste grimpis deklivon. Estis iom da tempo por partizanoj kaj lokanoj konsulti alternativon: konstrui baraĵon, aŭ permesi al germanoj enveturi vilaĝon. Armiloj kaj mitraletoj ne sufiĉis por batalo. Estis solvite permesi enveturon. Soldatoj sidis sur ŝarĝaŭto, en manoj mitraletojn. Mi kaŝis min sub arbustaro kaj observis. Nia avino, kiel ĉiutage, malgraŭ averto, ekiris al preĝejo priplori onklon Rudolf, kiel kutime, kaj ekzakte tien celis germanaj veturiloj. Min – la plej junan anon de la familio – sendis naive postkuri avinon, faktan estrinon de la familio, por „revenigi ŝin“. Mi kuris post avino kaj homoj el vilaĝo kontraŭ mi al kampoj kaj arbaroj savi sin. Mi sukcesis alproksimiĝi al avino kaj timeme kriis: „Avino, stultulino, revenu!!!“ Kaj tiu aŭtoritata virino post mia aŭdaca krio turniĝis kaj ekkuretis hejmen.

Kolizio de germanoj kaj partizanoj, inter kiuj estis „niaj“ rusoj, finiĝis bone. La milito proksimiĝis al sia fino kaj germanoj kun sia oficiro rezignis kontraŭ partizanoj. Partizanoj prenis de germanoj armilojn kaj veturilojn kaj kun unu loka junulino forveturis.

La lasta travivaĵo kun soldatoj devenas el aŭgusto 1968. Tiu mateno je la 21-a sur ĉielo tondris armeaj aviadiloj, malrapide flugantaj. Nin, dungito de publikaj servoj en urbo Semily, oni komisiis transporti per ŝarĝaŭto varon el entrepreno en Libštát. Ŝoforis Lojza Brandejs. Veninte en la entreprenon, ni estis ŝokitaj. Ni trovis nek unu homon en pordejo, nek ene, ĉiuj pordoj estis malfermitaj. Revenante sen varo, ni trafis malgrandan taĉmenton de rusa armeo, kiu maltrafis vojon, ĉar lokanoj ĉie ŝanĝis vojindikilojn por mistifiki soldatojn. Rusoj havis du tankojn kaj grandan kamionon kun ujego plena de petrolo. El ujego elverŝadis petrolo, ĉar la ŝtopilo estis difektita, eble iu „bonulo“ ĝin ŝtelis kaj soldatoj la ŝtopilon anstataŭis per fasketo de herbo. Unu el tankoj estis malveturkapabla kaj staris ĉe la rando de la vojo. Rusoj senespere kuradis tien kaj reen. El proksima teksfabriko scivole elvenadis junulinoj en nombro proksimume dudek. Allogis ilin fakto, ke temas pri junaj viroj. La situacio ne plaĉis al mi. Mi malkontente paŝis al soldatoj kaj vorte insultis pro ilia malprava alveno, perforta okupado de paca lando, kiu al neniuj minacis. Flanke staris en leda mantelo oficiro. Mi regis sufiĉe bone la rusan lingvon kaj daŭre riproĉis al rusoj, ke ne estas dece veni viziti amikojn per armiloj en manoj. Ili rigardis min per intereso kaj poste min primokis. Tio tuŝis min profunde kaj mi senpove ekploris kiel malgranda bubo. Kaj plu, mi ĉagrene hontis, ĉar junulinoj kunsente, hezite, skrupule alrigardis. Subite iu kaptis mian brakon kaj tiris min for. Mi ne protestis. Alkuris al mi ŝoforo Lojza kaj flustris: „Vi, idioto, ilia kapitano ekvenis al vi kaj preparis pistolon!“ Do mi dankas pri mia vivo al dika viro, portanto de malgrandaj okulvitroj, onidire estro de tiu teksfabriko. Li ne opiniis naive kiel mi, ke oni ne povas pafi al simpla senarmila civitano. Mia edzino ne estiĝis vidino kaj mia unujara filino orfino.

Esence mi ne kapablis senti malamon al rusaj soldatoj. Soldato estas nur armilo mem, plenumas ordonojn...La respondeca estas ordonanto! Pri veraj kialoj de la plenumitaj ordonoj oni ekscios nur post jaroj, kiam vero estas jam sensenca. Eĉ mi

mem povus esti ordonita en la jaro 1956 nuligi kontraŭrevolucion en Hungario...

Ankoraŭ mi rememoras el tiu tempo tiun tragedikomikan okazaĵon. En urbo Turnov ekloĝiĝis pola armeo kaj mi pro tio devis tranokti en hotelo „Ĉe Karolo la Kvara“, kie loĝis ankaŭ polaj oficiroj. Mi devas atentigi, ke ili kondukis dece. Matene mi per aŭtobuso vojaĝis laŭ mallarĝa distrikta vojo hejmen. Direkte al vilaĝo Rakousy en vojkurbaĵo subite ni trafis polan kirasitan veturilon. En nia patrujo jam mortadis niaj homoj, en Prago aperis tankoj kaj oni pafis. Timiga veturilo rigardis nin nur per malgranda fenestreto, kvazaŭ estu senhoma monstro. Mi sidis malantaŭ de stiristo kaj vidis, kiel liaj haroj subite histiĝis. Mi konvinkis, ke diraĵo pri histiĝo de haroj per teruro estas ververa. La monstro tamen oportune evitis, ke ni povu facile traveturi.

Do, nun mi scias, ke mia unua deziro fargi kamentubisto estis bona. Kamentubisto helpas al homoj, por ke povu en familia rondo varmiĝi kaj ion bongustan kuiri!

Zdenek Myslivec, Bozkov, Ĉeĥio

„Bombajky“ estis modo laŭ hinda koloniistoj en nia regiono. Ĝi konsistis el blanka jako, blankaj pantalonoj aŭ jupo kun zono el la sama materialo kaj du metalaj ringoj kiel buko. Post la milito oni jam plu ne uzadis ilin.

### **Demandoj kaj respondoj de Patrino Tereza**

Kiu estas la plej bela tago?	-	La hodiaŭa
Kio estas la plej granda malhelpo?	-	La timo
Kio estas la plej facila?	-	Erari
Kio estas la radiko de la malbonaj aferoj?	-	La egoismo
Kio estas la plej bela amuzo?	-	La laboro
Kio estas la plej danĝera malvenko?	-	Manko de kuraĝo
Kiuj estas la plej bonaj instruistoj?	-	La infanoj
Kio estas la plej necesa neceseco?	-	Por donaci min mem
Kio feliĉigas plej multe?	-	Por esti utila por alia homo
Kio estas la plej danĝera eraro?	-	La melankolio
Kio estas la plej vulgara sento?	-	La venĝo kaj malamo
Kio estas la plej bela donaco?	-	La kompreno kaj kunsento
Kio estas la necesa?	-	La hejmo, la ia aparteno
Kio estas la agrabla sento?	-	La interna paco
Kio estas la plej bona solvo?	-	La optimismo
Kio estas la plej granda kontenteco?	-	La farita devo
Kio estas la plej granda forto en mondo?	-	La kredo
Kiuj estas la plej gravaj homoj?	-	La gepatroj
Kio estas la plej bela afero en mondo?	-	LA AMO

## **Kiun vi elektus?**

Oidire ĝi estis demando dum laborintervjuo:

Vi preterveturas bushaltejon per aŭtomobilo en pluvega vetero, kaj ĉe la haltejo vi ekvidas tri senpluvobrelajn, atendantajn malfeliĉulojn malsekaj kaj tremantaj pro la malvarmo:

-Kriplan maljunulinon ?

-Vian malnovan amikon, kiu iam savis vian vivon?

-Kaj vian estontan amatinon?

Kiun vi elektus, se vi scias, ke per la aŭtomobilo vi povas veturigi nur unu personon?

Solvo:

Vi transdonas la lanĉoŝlosilon al via amiko, por veturigi la maljunulinon, vi atendas la aŭtobuson kun la knabino.

## **Mongola proverbo**

Se vi vivas sen ŝuldoj, vi estas riĉa, se vi estas sana, vi estas feliĉa.

## **Ĉu ni bezonas katastrofojn por komenci pensi tutmonde?**

Siv Burell. Svedio

ĵaŭdo 4a de Marto 2010 je 08:51

La "Vendreda grupo" en Gotenburgo korespondas kun E-grupo en Saintes. Saintes situas ĉe la rivero Charante en la sudokcidenta parto de Francio. La unuan de marto venis letero de la gvidanto de la franca E-grupo: Li skribis: .....Ah jes, efektive en nia regiono ventego blovis 159 km/ hore, kaj samtempe granda alta tajdo



alvenis... 50 personoj mortis. La maro superfluis digojn... kaj rapide eniris domojn, kelkafoje ĝis la tegmento. La insulo Ré estas partigita en diversaj lokoj ! Ĉe ni, en le chirkauaĵo de Saintes, la vento tre forte blovis sed ni havis malmultajn damaĝojn. Pro la altiĝo de la temperaturo, la nivelo de la maro grandiĝas...Probable tio estas nur la komenco de multaj aliaj katastrofoj.. Laŭlonge de la marbordo oni jam metits multajn rokojn, sed ne sufiĉe. Pluraj marĉoj kiuj estis preskaŭ sekaj denove estos la maro. Kion oni povas fari ? Eble lukto efika kontraŭ la varmiĝo okazos nur post grandaj katastrofoj? Kelkaj opinias ke por tiu lukto, oni bezonas mondan popol-estaron... Kion vi pensas pri tiu problemo ? ..... Mi meditetas: Ĉe vi la menaco estas la akvo, ĉe ni la neĝo, kiu jam pro sia pezo rompis tegmentojn de sporthaloj, brutejoj, magazenoj k.t.p. Kelkaj lernejoj estis fermitaj pro la risko ke la tegmentoj enfalu. La vintro en nia regiono daŭris pli longe ol kutime. Sed kompare kun Haito kaj Ĉilio nia mondparto elsaviĝis sen troa difekto Jes, kion fari? La vivo koncistas el ŝanĝoj. Vi pravas - katastrofoj vekas kaj pensigas homojn! Foje poste venos plibonigoj. Interreto, gazetoj, televido kaj radio havas grandan rolon sciigi homojn en la tuta mondo pri la malbona situacio en iu lando. Sed la memoro estas mallonga. Kiam nova katastrofo okazas, oni forgesas la pasintajn, kaj turnas la prilumadon tute al la nova. Jes iu speco de monda popol-estaro estas bezonata, registraro, kiu akordigas la interesojn de diversaj regionoj. UNo ne sufiĉe bone plenigis sian rolon. Kompreneble, ĉar kelkaj landoj povas vetoi bonajn proponojn, ĉiu lando ne pagas sian kotizon kaj multaj landoj ne volas rezigni siajn potencojn por fortigi UNo:n. Mi ankoraŭ ne spektis la filmon Avatar, sed mi intencas fari tion. En la filmo estaĵoj de alia planedo estas multe pli saĝaj ol la homoj ĉi tie. Do, la solvo devas esti ke ĉiu homo saĝe komencu pensi tutmonde. Esperanto povas esti unu el la iloj. Unu homo ne povas fari multe sed kune almenaŭ ion. Sed en la realo - kion fari?



## Reguloj de VIA vivo

**Vi ricevis korpon.** Vi povas ĝin ŝati, ami ĝin aŭ malami, sed per plena certeco vi posedos ĝin ĝis fino de via vivo.

**Vi envenis lernejon, kiu nomiĝas VIVO SUR PLANEDO TERO,** kaj ĉiu persono, ĉiu okazo estas via instruisto. Ne ekzistas eraroj, nur lecionoj. Progreson vi akiros per provoj. Malvenko estas parto de proceso same kiel sukceso. Ĉiu leciono ripetas diversforme, ĝis vi ekkomprenos. Nur poste vi povos iri plu. Se vi lecionon rifuzos, ĝi revenos, sed en pli kruela formo. Fakton, ke vi komprenis la lecionon, vi ekscios, ĉar via konduto ŝanĝos. Saĝecon oni lernas. Iom al io estas pli bona, ol amaso de nenioj.

**Aliaj homoj estas kvazaŭ speguloj.**

Vi ne povas ami ion ĉe alia, kion vi ne amas ĉe vi.

**Via vivo dependas nur de vi.**

La vivo donas tolonojn, vi estas pentristo. Ne ekzistas ĝusto kaj malĝusto, sed ekzistas nur sekvo.

## Kio povas okazi kiam ni provas esti helpemaj?

Nicole, Aŭstralio,  
novembro 201, jen mi tradukis tunel la angla

Georgo estas poŝtisto kaj lia laboro estas okupiĝi pri la leteroj kiuj ne havas klaran adreson. Kelkajn tagojn antaŭ kristnasko alvenis letero. Sur la koverto estis la vortoj Al Dio (pardonu, sed mi ne scias kio estas via preciza adreso). Georgo decidis malfermi la leteron:

*Kara Dio,*

*Mi estas maljuna vidvino. Hieraŭ ŝtelisto forprenis mian monujon. En ĝi mi havis 100 dolarojn kaj tio estis mia tuta mono. Por kristnasko mi invitis du amikinojn, sed nun mi ne plu havas monon por aĉeti manĝaĵojn por ili. Mi ne scias, kiu povus helpi min, do mi pensis pri vi, Dio. Ĉu vi bonvolus helpi min? Mi estas tre honesta kaj afabla persono.*

*Kun antaŭdankoj, Helena*

Georgo estas bonkora viro kaj do li kompatas Helenan. Li decidis meti la leteron sur la muron en la poŝta ĉambro kie ili apartigas la leterojn laŭ la sendoloko. Ankaŭ la aliaj poŝtistoj estis bonkoraj kaj decidis helpi per donaco de iom da mono.

Je la fino de la tago, ili donacis entute \$95 dolarojn. Georgo metis la monon en koverton kaj sendis al Helena. La poŝtistoj ĉiuj kontentis, ke ili povis helpi Helenan kaj ke dank' al ili Helena trapasos agrablan kristnaskan feston.

Kelkajn tagojn poste alvenis alia koverto kun la vortoj Al Dio sur ĝi. Temis pri letero de Helena.

*Kara Dio,*

*Mi ege, ege dankas vin pro via helpo. Dank'al vi mi kaj miaj amikinoj trapasis tre agrablan kristnaskan feston kaj bone manĝis. Mi vere kore dankas al vi. Miaj amikinoj kiuj iom dubis pri via ekzisto nun fervore kredas je Dio. Tamen mi volas menciigi al vi, ke mankis 5 dolaroj en la koverto. Mi supozas, ke tiuj aĉaj poŝtistoj ŝtelis la 5 dolarojn.*

*Tre dankeme, Helena.*

### **Dalajlama diris**

kiam oni demandis lin: „Kion surprizas vin pri homoj kaj homvivo?“

Li respondis: „Homoj oferas sian sanon, por ke perlaboru monon, poste ofertas monon, por ke la sanon denove akiru. Ankaŭ homoj okupas multe pri pasinteco kaj estonteco, ne travivas plene estantecon kaj ... tiel vivas nek en estantecon nek en estonteco ... vivas kiel neniam mortus. Poste ili mortos sen ia senca vivado.“

### **Ĉina proverbo**

Kio ne estas reuzebla, estas perdita tempo.

Ekzistas nur unu afero, kiu duobligas, se vi disdividos ĝin.

(solvo sur sekva paĝo)



## **Mia testamento por miaj amikinoj kaj kelkaj amikoj.**

laŭte legite en Skokovy 2011 en oktobro.

Karaj, ni vidas, ke miaj tagoj plenumiĝas kaj mi sentas, ke mia korpo, tago post tago, senĉese malvarmiĝas. Mi petas vin, neploru. Tro valora mia korpo ne estas. Mi petas vin, mia verda familio, helpu kaj subtenu min! Ĉar por mia tre malbona situacio mi havas tiun ideon. laŭ antika filozofo. Kiam li estis en simila stato, havigis al si du junulinojn, kiuj lian korpon de du flankoj dum la nokto varmigis. Mi timas, ke tio ne sufiĉos, ĉar mi bone konas mian korpon, ke por mi du junulinoj ne sufiĉos kaj mi petas ankoraŭ du aliajn, la tria sub mia kompatinda korpo kaj la kvara super. Verŝajnas, ke mi, kvankam ankoraŭ varma, tiun ĉi flegon ne travivos. Precipe kiam la kvara virino estos bone vivtenanta. Sed tio ne gravus. Por mi tio estus tre belega fino post mia malvarmega vivo.

*Rimarko: Junulino, laŭ nia gusto, estu kiu ajn juna kiel proksimume mi.*

Zdenek Myslivec, Bozkov, Ĉeĥio.

## **Malbono ne ekzistas**

Laŭ „Brněnská tisková misie, o.s. [www.btm.cz](http://www.btm.cz)

Iu profesoro en iu universitato demandis al studentoj: „Ĉu la dio kreis ĉion sur la tero?“ Iu studento respondis „Jes.“ La profesoro denove insistis: Ĉu vere ĉion? Ĉu ankaŭ malbonon? Do, poste fakte la dio ne estas bona, dio estas malbono!“

La studentoj silentis. La profesoro estis kontenta pri si mem.

Sed iu alia studento aliĝis por demandi. „Sinjoro profesoro, ĉu mi rajtas starigi demandon?“ „Kompreneble,“ jesis la profesoro. La studento stariĝis kaj demandis: „Ĉu ekzistas malvarmo?“ „Certe, ;stranga demando, vi neniam malvarmas?“ La studentoj ekridis. La studento daŭrigis: „Reale, sinjoro, la malvarmo ne ekzistas. Laŭ reguloj de fiziko, malvarmo estas nur manko de varmo. Homon kaj objektojn ni povas science priskribi kaj mezuri iliajn varmecon, varmecan energion, sed neniam radiadon de malvarmeco. La nocion „malvarmo“ oni kreis, por ke ni povu priskribi, ke ni sentas manko de varmo.“

La studento parolis plu: „Sinjoro profesoro, ĉu ekzistas mallumo?“

„Kompreneble, ke ekzistas,“ respondis la profesoro.

„Ne, same, ankaŭ la mallumo ne ekzistas. Reale estas mallume danke al neesto de la lumo. Lumon oni povas esplori, sed la mallumon oni mezuri ne povas. Mallumo ne havas sian mezurilon. Mallumo estas nur vorto, kiun elpensis homoj por nomi mankon de la lumo.“

La junulo donis sekvan demandon: „Sinjoro, ĉu vere ekzistas malbono?“

La profesoro penseme respondis: „Nu, certe, ĉiutage okazas malbono. Homoj estas

agresemaj, fiagas, perfortas, ĉio estas manifesto de malbono.“

La studento respondis: „Malbono ne ekzistas, sinjoro. Malbono estas manko de bono, manko de amo en koro de homo. La malbono ekestas same kiel malvarmo kaj mallumo.“

La profesoro eksilentis kaj sidiĝis.

Onidire, la juna studento estis Albert Einstein.

Laŭ materialoj de „Brněnská tisková misie o.s.“

## Nobla arbo

Shel Silverstein



En mia elektronika leterkesto aperis tiu ĉi rakonto en ĉeĥa lingvo, pri kiu mi ne scias kiu ĝin verkis, aŭ kiu ĝin tradukis al la ĉeĥa lingvo. La rakonto tre kortuŝis min kaj mi tradukis ĝin al Esperanto.

el la libro „Okazaĵoj por ĝojigo de animo“ – Bruno Ferrero.

Iam estis arbo, kiun ŝatis iu infano. Ankaŭ la arbo ŝatis la infanon. Ili amis unu la alian reciproke. La infano kolektis foliojn de la arbo, plektis el ili kronon sur kapon kaj ludis kiel reĝo de la arbaro. La infano grimpis sur la arbon, lulis en ĝiaj branĉoj, manĝis ĝiajn fruktojn kaj kaŝludis. Kiam la infano laciĝis, dormetis en ombro de la arbo kaj branĉoj lulkantis. La infano amis la arbon el la tuta infana koro kaj la arbo estis feliĉa. Sed la tempo kuris kaj la infano kreskis. Kiam la infano estis matura, la arbo ofte solis.

Iun tagon venis la infano al la arbo kaj la arbo diris: „Venu al mi infano mia, grimpu mian trunkon kaj lulu vin en miaj branĉoj, gustumu miajn fruktojn, ludu en mia ombro kaj estu feliĉa.“

„Ne konvenas grimpi en mia aĝo, mi jam ne ludas ĝenerale,“ diris la infano, „mi volas aĉeti iajn objektojn, mi volas distriĝi. Mi volas havi monon. Ĉu vi povas doni al mi ĝin?“

„Bedaŭrinde,“ respondis la arbo, „mi ne havas monon. Mi havas nur foliojn kaj fruktojn. Pluki ilin, infano mia, kaj vendu ilin en urbo. Tiel vi akiros monon kaj vi estos feliĉa.“

Do, la infano grimpis la arbon kaj plukis ĉiujn fruktojn kaj forportis ilin. Kaj la arbo

estis feliĉa. Sed la infano longan tempon ne revenis kaj la arbo malgajis. Post ia tempo la infano revenis. La arbo eksusuris per ĝojo: „Venu al mi infano mia, grimpu mian trunkon, ludu en miaj branĉoj kaj estu feliĉa.“

„Mi estas tre okupata kaj mi ne havas tempon grimpi arbojn,“ respondis la infano, „Mi volas havi domon, kiu protektus min. Mi volas havi edzinon kaj infanojn, mi bezonas domon. Ĉu vi povas doni al mi domon?“

„Mi ne havas domon,“ diris la arbo, „sed vi povas forsegi miajn branĉojn kaj la domon konstrui el ili Poste vi estos feliĉa.“

La infano forsegis ĉiujn branĉojn kaj forportis ilin, por konstrui al si domon. Kaj la arbo estis feliĉa.

Poste tre longe la infano ne revenadis kaj kiam la infano venis, la arbo por kortuŝo ne povis paroli, nur susuris: „Venu al mi infano mia kaj ludu kun mi.“

„Mi estas tro maljuna kaj malgaja por ludi,“ respondis la infano, mi bezonus ŝipon, por forvojaĝi malproksimen. Ĉu vi povas doni al mi ŝipon?“

„Segu mian trunkon kaj konstruu ŝipon,“ diris la arbo, „kaj vi povos forvojaĝi kaj esti feliĉa.“

Kaj la infano forsegis la trunkon, konstruis ŝipon kaj forvojaĝis kaj la arbo estis feliĉa ...sed ne tute.

Post tre, tre longa tempo la infano revenis.

„Mi bedaŭras infano mia, mi jam havas nenion por doni al vi“, diras la arbo, „mi ne havas fruktojn...“

„Miaj dentoj jam estas malbonaj, mi jam ne povus manĝi ilin.“

„Mi eĉ ne havas branĉojn, por ke mi povu vin luli.“

„Mi jam estas tro maljuna por luli en branĉoj.“

„Mi volonte al vi ion donus, sed mi havas jam ...nenion, mi estas nur maljuna arbostumpo. Mi bedaŭras...“

„Mi jam bezonas malmulte,“ diris la infano, „nur trankvilan lokon, kie mi sidu kaj ripozu. Mi sentas grandan lacecon.“

„Do la maljuna arbostumpo estas la taŭga loko, kie vi povas sidi kaj ripozi.“

La infano sidiĝis kaj la arbo estis feliĉa.

JoDo

## ENHAVO de la LEGOLIBRETO VII.

Aleš Vávra .....	2
Internacia lernejo, Nicole Else.....	3
Aŭtuno, Kerstin Rohdin.....	10
Bluĉiela Mongoli, Elda Doerfler.....	13
Ĉu povas esti malalta viro alloga al virino? Eva Papoušková.....	16
Pri stelo Sírius kaj libertempo, Vladimír Mates.....	17
Interparolo en ĉielo.....	18
Dio estas.....Blanka Hužerová.....	20
Intervjuo kun nia gasto el Francujo.....	22
Mia blogo pri Esperanto, Béla Kovacs.....	24
La knabeto kaj la ponto, Béla Kovacs.....	25
Rakonto pri honestaj kaj nehonestaj homoj, niaj kuncivitanoj.....	26
Renkontiĝo en Skokovy, Eva Pánková .....	27
Lulkanto, Dormu milde, Nanne Kalma, muzikistaro:: Kajto .....	30
Urĝa helpo, Pavel Tomeš .....	31
Pri arboj, J.Drahotová .....	32
Boleslavaj legendoj .....	33
Vintra okazaĵo .....	36
Tabulorasismo, Vladimír Tomeš .....	36
Realo vs. Deziro, Petr Baláž .....	38
Versaĵo de ukraina humoristo Stepan Olijnik .....	39
La verda movado, Nicole, Aŭstralio .....	40
Miaj tri nemalmemoreblaj travivaĵoj, Zdenek Myslivec .....	42
Demandoj kaj respondoj de Patrino Tereza .....	46
Kiun vi elektus? .....	47
Ĉu ni bezonas katastrofojn por komenci pensi tutmonde? Siv Burell .....	48
Reguloj de VIA vivo .....	49
Kio povas okazi, kiam ni volas esti helpemaj, Nicole Aŭstralio .....	50
Mia testamento por karaj amikinoj kaj kelkaj amikoj, Zd. Myslivec.....	52
Malbono ne ekzistas, www.btm.cz .....	53
Nobla arbo. ....	56

